

# Vortareto por Ili kaptis Elzan de Claŭde Piron

Laŭ la **Bazaj radikoj Esperanto-Esperanto** de Wouter F. Pilger

*{\*0}: iloj; {\*1}-{\*9}: radikoj laŭ ofteco kaj utilo (laŭ la Akademia 'Baza Radikaro Oficiala'); {X}: aldonoj ne en la Akademia listo.*

[www.eventoj.hu/steb/vortaroj/bazaj-radikoj-pilger/bazaj-radikoj-pilger.htm](http://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/bazaj-radikoj-pilger/bazaj-radikoj-pilger.htm)

Kaj **Reta Vortaro** [www.reta-vortaro.de/revo/](http://www.reta-vortaro.de/revo/)

800 radikoj

aranĝita de Emilio Cid - [cid.emilio@gmail.com](mailto:cid.emilio@gmail.com)

marto/2015

## Instruoj

1 - Aŭskultu la voĉ-registradon (KD, MP3) de la unua parto de la ĉapitro (*longaj ĉapitroj estas dividitaj en partoj per \*\*\**), kaj ripetu ĉiujn frazojn dum la paŭzoj.

2- Serĉu en la vortaro la unuan vorton, kiun vi ne konas. Legu ĝian klarigon kaj provu kompreni ĝin en Esperanto, sen traduki.

3- Legu mense la unuan frazon de tiu parto de la ĉapitro, kaj provu kompreni ĝin sen traduki. Ripetu tion por la venontaj frazoj, ĝis la frazo, en kiu aperas la nova vorto.

4- Relegu laŭte tiujn frazojn, akompanante la voĉ-registradon, kaj ripetante ilin dum la paŭzoj. Faru tion almenaŭ du-foje.

5- Reiru al la 2a paŝo por serĉi la venontan nekonatan vorton. Faru tion ĝis la fino de tiu parto de la ĉapitro. (*se vi ne trovas vorton en la listo de iu ĉapitro, tio signifas ke ĝi jam aperis en antaŭa ĉapitro, do konsultu la alfabetan liston en la fino de ĉi tiu kajero*)

6- Aŭskultu la voĉ-registradon de tiu parto de la ĉapitro, sed ne legante la libron. Provu kompreni la rakonton nur per la aŭskultado. Faru tion almenaŭ du-foje.

8- En via grupo de Esperanto provu rakonti tiun parton de la ĉapitro per viaj propraj vortoj. Starigu demandojn pri ĝi al viaj kolegoj, kaj respondu iliajn demandojn. Dum tiu paroliga ekzerco, la libro restu fermita.

# Listo laŭ apera ordo

## Ĉapitro 1 67 radikoj

- ĉapitr-** \* parto de teksto en libro kun propra komenco kaj fino {\*6}
- polic-** \* ŝtataj aŭ urbaj funkciuloj por teni ordon kaj sekurecon; policano, policisto: unu tia funkciulo {\*6}
- kapt-** \* ekpreni, tiel, ke la kaptaĵo aŭ kaptito ne plu povas foriri; (figure: kapti la atenton, la signifon) {\*4}
- vir-** \* homo (aŭ besto) kiu ne povas naski, sed kiu necesas por generi (naskigi) idon {\*2}
- dir-** \* elbuŝigi vortojn; buŝe sciigi (diri ion al iu) {\*2}
- telefon-** \* elektra aparato por transporti sonojn je granda distanco; telefoni: paroli al iu per telefono {\*6}
- son-** \* fari tiel, ke oni povas rimarki per oreloj {\*3}
- respond-** \* diri (aŭ fari) ion post demando (pri tio, pri kio oni demandis); sendi leteron post ricevo de letero; akordiĝi kun io (esti kvazaŭ la respondo al ĝi) {\*2}
- mal-** \* [tute ne; inverse; kontraŭe] (mallonga, malamiko, mallumo, malakcepti, mallaŭdi, malsupre, malpli,...) {\*0}
- proksim-** \* en malgranda distanco; troviĝanta apude {\*2}
- voĉ-** \* la sono de homa parolado aŭ besta blekado; la (esprimita) opinio de unu persono inter multaj {\*5}
- kred-** \* pensi, ke io estas vera, ne havante pruvon {\*2}
- ripet-** \* fari aŭ diri denove, duan (trian,...) fojon {\*5}
- kunven-** kiam homoj estas kune por priparoli ion, rigardi ion, aŭskulti ion,... (kun/ven/o) {X}
- antaŭ** \* en tempo pli frua; en loko pli proksima; pli frue en vico; antaŭo: flanko kutime vidata unue; (homo:) vizaĝo, brusto,...; antaŭdiri: jam antaŭe diri ke io nesciata okazos {\*1}
- vid-** \* rimarki per la okuloj; (figure: kompreni) {\*2}

- por** \* [celo, intenco, destino, uzo, ricevanto, estonta daŭro]; (esti por propono: ne kontraŭ); (por ke: [celo de ago]) {\*1}
- morgaŭ** \* en/dum la tago post la nuna tago {\*1}
- vesper-** \* komenco de nokto post tago; mallumiĝo {\*3}
- pov-** \* esti kapabla fari; havi eblecon fari {\*2}
- okaz-** \* fariĝi aŭ esti farata; okazaĵo: tio, kio okazas; okazo: apartaj cirkonstancoj aŭ momento, kiam io povas okazi (en tiu okazo ni prefere ne faru tion) {\*2}
- sci-** \* havi informon, ideon en kapo; sciigi: informi {\*2}
- don-** \* havigi; enmanigi (doni ion al iu); mal-preni {\*2}
- inform-** \* sciigi (pri io); informiĝi: ekhavi informojn {\*6}
- diabl-** supernatura estulo aŭ estaĵo de malbono {8}
- far-** ekesti (iom post iom aŭ subite); ŝanĝiĝi al; ekhavi profesion aŭ funkcion; evolui al; okazi (far/iĝ/i) {X}
- neni-** \* eĉ ne unu el; eĉ ne unu homo, individuo, ekzemplero,... {\*1}
- atend-** \* resti ĝis alveno de iu/io; resti ĝis io okazos; firme pensi, ke io okazos; ne jam fari ion (ĝis...) {\*3}
- kontakt-** kiam du objektoj tuŝas unu la alian; kiam du personoj havas interrilaton; kontakti: havi kontakton; kontaktilo: aparato por fari elektran cirkviton per kontakto inter metalpecoj [(kontakt)ŝtopilo, ŝtopilingo,...] {X}
- ir-** \* movi sin de loko al loko per piedoj, flugiloj, naĝiloj; funkcii per movo {\*2}
- el** \* de en; [origino; fonto; materialo; konsisto]; el- (ankaŭ:) el fundo, ĝisfunde, komplete (elĉerpi, ellerni, elmontri,...) {\*1}
- trink-** \* enbuŝigi likvon (akvon, lakton, kafon,...) {\*3}
- aper-** \* ekvidiĝi; ekesti; montri sin; esti publikigita {\*4}
- nokt-** \* kiam ne estas lumo de la suno; inter vespero kaj mateno {\*4}
- alt-** \* (kun granda) mezuro vertikale (de malsupro ĝis supro); je granda distanco super la tero (aŭ super io

alia); respektinda; povanta ordoni (al iu malpli alta laŭ rango aŭ pozicio) {\*2}

**fort-** \* tre kapabla por puŝi, tiri, levi, rezisti; posedanta siajn ecojn en granda grado {\*2}

**kies** \* [posedanto?]; de kiu(j)?; apartenanta al kiu(j)? - (... , kies...: [=] aparteno) {\*1}

**vest-** \* io por meti sur la korpon por (parte) kovri ĝin; vesti sin: kovri sian korpon per vesto (taŭga por la okazo) {\*3}

**aŭ** \* [elekto] (Ĉu vi trinkos teon aŭ kafon?) {\*1}

**ag-** \* fari ion pri io; aktive okupiĝi pri io; ne resti senfara; (agi al/kun iu(j):) kondukti, trakti {\*5}

**manier-** \* tiel, kiel iu faras ion; tiel, kiel okazas io {\*5}

**neniel** neniumaniere; tute ne {9}

**kon-** \* scii, ke oni jam vidis, aŭdis aŭ legis ion; scii, ke oni jam vidis aŭ renkontis iun; memori la signifon aŭ enhavon de io; havi sperton pri io, aŭ pro kontakto kun iu {\*2}

**funkci-** servo, laboro, agado, kiun iu (aŭ io) faru (la funkcio de kelnero estas alporti manĝaĵojn kaj trinkaĵojn; la funkcio de kasisto estas enkasigi pagojn; la funkcio de la nazo estas spiri kaj flari; la funkcio de horloĝo estas montri la (ĝustan) horon); funkcii: plenumi funkcion; agi laŭ sia funkcio {8}

**diskret-** Diranta nur, kion konvenas diri; scianta konservi sekreton

**paŝ-** \* piede iri; meti unu piedon antaŭ la alian; paŝo: unu tia pied-meto; distanco de unu paŝo {\*4}

**rid-** \* per buŝo kaj sono (ne vortoj) montri ĝojon,...; rideti: per buŝo sen sono montri ĝojon, kontentecon,... {\*2}

**sent-** \* ekhavi per la fingroj, per la haŭto aŭ interne en la korpo impreson doloran aŭ plezuran; ekhavi impreson agrablan aŭ malagrablan; ekhavi impreson ne racie klarigeblan; sin senti ...: laŭ propra konscio esti ... {\*3}

**ver-** \* tiel, kiel estas; tia, kia estas; malfalsa; ne mensogita {\*3}

**komenc-** \* fari/konsistigi la unuan parton; ekfari; komenci -i: (ĵus antaŭe ne -i, sed) nun -i; komenciĝi: (ek)esti en sia unua parto; (ĵus antaŭe ne esti/okazi, sed) nun esti/okazi; komenco: ekfaro; la unua parto; la unua momento {\*2}

**fin-** \* igi kompleta; baldaŭ ne plu fari; fari/konsistigi la lastan parton; ĉesigi; finiĝi: esti en sia lasta parto; ĉesi; fino: lasta parto aŭ momento; ĉes(ig)o; fin(aĵ)o: ekstremaĵo {2}

**movad-** ripetata aŭ daŭra movo; komuna agado de homgrupo (organizita en asocio aŭ ne) por atingi iun celon (mov/ad/o) {X}

**eŭrop-** (nomo de kontinento) (fakte unu kontinento kun Azio: Eŭrazio) {9}

**respondec-** kiu devas respondi demandojn pri iu agado (ankaŭ, se tiu mem ne faris); kritikebla, kiam io (agado, farado, okazaĵo) ne iras bone (ankaŭ, se tiu mem ne kulpas) (respond/ec/a) {X}

**tiom** \* en tiu kvanto; en tiu/tia (granda) amplekso {\*1}

**mort-** \* senviviĝi {\*2}

**ekde** De la komenco de, komencante de

**bomb-** objekto (batalilo), ĵetata al malamika loko, kiu eksplodas kiam ĝi atingas la celon {X}

**flug-** \* sin movi en aero, kiel birdo aŭ insekto; moviĝi en aero per aparato (aviadilo, balono, helikoptero,...) {\*3}

**haven-** ŝirmita loko por en- kaj elŝarĝado de ŝipoj {7}

**hieraaŭ** \* en/dum la tago antaŭ la nuna tago {\*1}

**sinagog-** Juda preĝejo

**strat-** \* (parto de) vojo, kie veturas veturiloj {\*4}

**bedaŭr-** \* diri aŭ pensi: "estas malbone, ke tio okazis tiel" {\*6}

**nur** \* ne pli ol (nur tiom); nenio/neniu alia ol (nur ŝi; nur tiu; nur tio); ne alimaniere ol (nur tiel); ne en alia tempo

ol (nur tiam); ne sen plenumo de kondiĉo (nur se) { \*1 }

**sekv-** \* iri post iu/io; veni post iu/io alia; iri laŭ { \*2 }

**ĵus** \* antaŭ tre mallonga tempo; antaŭ momento { \*1 }

## Ĉapitro 2 230 radikoj

**problem-** io, kio estas malfacile solvebla aŭ klarigebla; io, por kio solvo aŭ klarigo estu trovita (scienca problemo, ŝak-problemo,...) { 8 }

**est-** \* [esti -a; esti -o; esti -e]; identi; ekzisti; troviĝi { \*2 }

**neniam** \* en neniuj tempo; en neniuj cirkonstancoj { \*1 }

**edz-** \* viro ligita al virino (iuloke: al vir(in)o(j)) por vivi kune, per ceremonio (geedziĝo, nupto), kontrakto aŭ fakto { \*3 }

**kontent-** \* pensanta, ke ĉio estas bona, ke ĉio okazis bone, ke oni havas ĉion, kion oni bezonas { \*4 }

**kiam** \* [tempo? cirkonstanco?] - (... , kiam...: [ <=> samtempe ]) { \*1 }

**frat-** \* vira ido de la samaj gepatroj (rilate al alia ido) { \*3 }

**parol-** \* diri vortojn kaj frazojn { \*2 }

**vort-** \* sinsekvaj sonoj (aŭ literoj) kun signifo { \*2 }

**ili-** \* tiuj homoj, bestoj, plantoj, objektoj, ideoj { \*1 }

**turn-** \* meti antaŭon malantaŭen aŭ supron malsupren (tiel, turnita "b" estas "d" aŭ "p"); movi ĉirkaŭ (imagita) akso (tiel, turnita "^" povas esti ">"); ŝanĝi la direkton { \*3 }

**kap-** \* korp parto kun cerbo, buŝo, okuloj, oreloj; (figure: cerbo; estro; komenca aŭ supra parto) { \*2 }

**kvazaŭ** \* ne vere tio/tiu, sed tute simila al tio/tiu; ne vere tia, sed tute simila; ne vere tiel, sed tute simile { \*1 }

**decid-** \* ne plu diskuti, sed diri: "tiel estu", "tiel okazu"; fiksi sian opinion aŭ volon, post konsiderado { \*5 }

**las-** \* ne ŝanĝi; ne forpreni; restigi; ne ĝeni; ne malhelpi; ne malpermesi; forlasi: foriri kaj restigi { \*3 }

**minut-** \* 60 sekundoj; 60-ono de horo [mezuro por tempo] { \*4 }

**pac-** \* sen milito; sen bataloj; sen kvereloj { \*3 }

**kial** \* [kaŭzo? bazo? motivo?]; kialo: tio, pro kio { \*1 }

**tiel** \* en tiu maniero, tiumaniere; en tiu grado, tiugrade { \*1 }

**efik-** \* havi, kaŭzi (konstateblan) rezulton; estigi; influi { \*5 }

**jar-** \* 12 monatoj; 365 aŭ 366 tagoj; sunciklo { \*2 }

**nun** \* en ĉi tiu tempo; en ĉi tiuj cirkonstancoj { \*1 }

**riĉ-** \* kun multe da mono, havaĵoj; kun multe da valora enhavo (ekzemple: libro riĉa je bildoj) { \*2 }

**taks-** fari al si opinion pri la ŝatindeco de iu/io; fari al si opinion pri la valoro de io { 7 }

**potenc-** kapablo (forte) influi; kapablo obeigi; (matematiko: la kvara potenco de 3 estas  $3 \times 3 \times 3 \times 3 = 81$ ) { 7 }

**mon-** \* per kio oni pagas [dolaroj, eŭroj, dinaroj, rupioj, enoj,...]; monbileto: papera mono; monero: metala mono { \*3 }

**hav-** \* posedi; esti kun; ne esti sen { \*2 }

**un-** \* 1; dek unu: 11; unuo: kvanto aŭ mezuro uzata por nombri (kg, m,...); unueco: ĉiuj kune en konsento, akordo { \*1 }

**plej** \* (la plej granda libro: ne estas iu pli granda libro); (plej forte: ne eblas pli forte) { \*1 }

**sukces-** \* ekhavi bonan, celitan rezulton { \*5 }

**industri-** \* farado de produktoj el krudaj materialoj { \*6 }

**land-** \* parto de Tero, aparta pro geografio aŭ historio (ne ĉiam = ŝtato aŭ = regno); (eksterlando: aliaj landoj ol la propra) ("ŝtato" kaj "regno" estas politikaj terminoj) { \*2 }

**knab-** \* juna viro { \*3 }

**ven-** \* movi sin/moviĝi al la loko de la parolanto aŭ al la loko de la alparolato aŭ al interkonsentita loko aŭ al priparolata okazaĵo; (ankaŭ:) (veni al:) atingi; havi rezulton; (veni de:) origini en; esti rezulto de { \*2 }

**aŭtoritat-** influo bazita je respekto; povo rajtigita por postuli obeadon; instanco kun tia povo {8}

**super** \* pli alte ol (ne tuŝante); supersigno: signo super litero (ekzemple: "^"); supera: pli alta, pli bona {\*1}

**bon-** \* kun la ĝustaj ecoj; kontentiganta {\*2}

**humor-** animstato [ĝoja, malĝoja, gaja, malgaja, kolera,...] {7}

**vetur-** \* iri per veturilo (aŭto, biciklo, ŝipo...) {\*2}

**direkt-** \* tien, kien iu/io iras; vojo irota [norden, dekstren, rekte antaŭen,...]; direkti: turni kaj/aŭ irigi al iu direkto aŭ celo (ankaŭ: orkestron, entreprenon,...); stiri {\*4}

**hospital-** malsanulejo, kuracejo {8}

**silent-** \* ne paroli, ne brui, ne fari sonojn {\*4}

**ŝofor-** kondukisto de aŭtomobilo, aŭtobuso,...; veturigisto; ŝofori: veturigi (aŭton) {8}

**help-** \* faciligi ies laboron; kune fari; esti utila por {\*2}

**gaj-** \* ridema, senzorga {\*4}

**-ig-** \* [fari -a, -o; kaŭzi ke io/iu -as] (je 100°, akvo bolas, sed homo boligas akvon) (grandigi, ruinigi, kunigi, ridigi, laborigi, surtabligi, enpoŝigi,...); igi: fari, kaŭzi {\*0}

**profund-** \* (kun granda) mezuro inter la malferma parto kaj la fundo (profunda rivero, puto, fosaĵo, groto - ankaŭ: profundaj pensoj) {\*4}

**spir-** \* enigi kaj eligi aeron tra nazo aŭ buŝo {\*5}

**ŝajn-** \* eble vere, eble ne vere esti (ŝajnas al mi, ke... = mi pensas, ke estas...) (kio nur ŝajnas esti, do ne estas) {\*2}

**strang-** \* miriga; ne laŭ atendoj; neniam vidita {\*6}

**fam-** \* konata en multaj lokoj, de multaj homoj {\*6}

**mastr-** \* estro de labor(ej)o, domo, bieno, trinkejo,...; mastri: estri (kiel mastro) {\*5}

**grand-** \* pli multe ol ordinare (laŭ mezuro, kvanto, grado,...); (kun granda) mezuro en ĉiuj direktoj

(longo, alto, larĝo); ampleksa; kun multaj anoj (popolo, asocio,...) {\*2}

**hom-** \* (Homo sapiens); viro aŭ virino aŭ knabo aŭ knabino; la homaro: ĉiuj homoj sur Tero {\*2}

**mond-** \* Tero kun ĉio kaj ĉiuj sur ĝi {\*2}

**ĝeneral-** \* ofte kaj multloke vidata, aŭdata, farata,...; same aplikebla al pluraj grupoj, kategorioj,... {\*6}

**kiel** \* [maniero? grado?; simileco; ekzemplo; funkcio] - (... , kiel...: [=] sammaniere; samfunkcie; samgrade; simile) {\*1}

**infan-** \* juna homo; ido de homo (aŭ besto); filo aŭ filino {\*2}

**almenaŭ** \* tiom aŭ ne nur tiom, sed pli; ne malpli ol {\*1}

**tem-** tio, pri kio oni parolas, pensas, skribas {7}

**intim-** tute persona, ne publika; en rilato tre amikeca, senĝena, konfida {9}

**ol** \* [komparo: malsama] (pli ol; malpli ol; alia ol) {\*1}

**diskut-** interparoli, interŝanĝante opiniojn {7}

**rilat-** \* esti en iuspeca ligo; havi kontakton en certa maniero {\*6}

**ekonomi-** orda, ŝparema mastrumado (de hejmo, bieno, entrepreno, ŝtato,...); scienco de mastrumado {8}

**politik-** arto de regado de ŝtato; praktikado de tiu arto {7}

**situaci-** la tuto de la cirkonstancoj kaj kondiĉoj {9}

**sed** \* [kontrasto] (ne tiu, sed tiu; ne tiel, sed tiel; ne aŭto, sed ĉaro; ne ruĝa, sed blua; mi manĝis, sed ne satiĝis) {\*1}

**person-** \* homo, konebla laŭ nomo aŭ funkcio; homo kun siaj propraj ecoj; (gramatiko:) parolanto ("unua persono"), alparolato ("dua persono") aŭ priparolato ("tria persono"); personeco: la propraj (ne-korpaj) ecoj (karaktero, konduto,...) de iu homo, kiel tuto {\*3}

**kun** \* [akompano, helpo] (li promenis kun sia amiko; mi faris tion kun li); ne sen (teo kun sukero); (kune: ne

aparte; ne dise); kunigi: igi kunaj; kuniri: iri kune {\*1}

**tim-** \* pensi, ke malbono povos okazi; malkuraĝi {\*3}

**ĉiam** \* en ĉiuj tempoj; en ĉiuj cirkonstancoj {\*1}

**spert-** \* kiu havas sciojn, akiritajn per praktikado kaj ekzercado aŭ akiritajn pro travivaĵoj; sperti: ekhavi sciojn per praktikado aŭ pro travivaĵoj {\*6}

**foj-** \* unu okazo de faro aŭ fariĝo (io okazas unu fojon aŭ ripete plurajn fojojn); foje: unu fojon; (tre) malofte {\*2}

**viv-** \* esti inter naskiĝo kaj morto, kun agoj kaj spertoj inter tiuj; povi movi sin, nutri sin, reprodukti sin (ŝtono aŭ metalo ne vivas); travivi (ion): sperti, senti dum sia vivo {\*2}

**par-** \* duo de samspecaj aferoj (paro da ŝuoj, paro da gantoj, paro da okulvitroj,...); du interligitaj homoj (geedza, gefianĉa paro,...); para: (pri nombroj:) senreste dividebla per 2 [2, 4, 6, 8,...]; nepara: [1, 3, 5, 7,...] {\*6}

**am-** \* tre ŝati; havi plej korajn sentojn por iu/io {\*2}

**trezor-** alte ŝatata, bone gardata havaĵo; tuto de la multekostaj objektoj kaj (aŭ) mono apartenanta al iu/io {8}

**objekt-** \* aĵo konkreta; (gramatiko:) tio/tiu, al kio/kiu la ago estas direktita (t.e. unu funkcio de komplemento) {\*5}

**for** \* al malproksima loko (iri for aŭ foriri, ĵeti for aŭ forĵeti); ne (plu) ĉi tie (esti for); (fore: malproksime) {\*1}

**-ebl-** \* [oni povas fari] (videbla, komprenebla, forviŝebla, nelegebla,...) ("eble" (=imageble, penseble) ofte signifas: povas esti aŭ ne esti, okazi aŭ ne okazi); ebleco: kiam la cirkonstancoj permesas; ebligi: kaŭzi, ke io estas farebla aŭ ke io povas okazi {\*0}

**san-** \* kun bone funkcia korpo (kaj menso) {\*4}

**sufer-** \* senti (tre) malbone pro io, kio okazas, aŭ pro io, kion faras iu alia; esti tiu, al kiu okazas io malbona {\*4}

**kaŭz-** \* tio, pro kio io okazas necese; kaŭzi: necese okazigi {\*4}

**vek-** \* igi maldorma; fini ies dormon {\*4}

**nov-** \* ne jam ekzistanta; ne antaŭe ekzistinta; ne jam okazanta; ne antaŭe okazinta; ne antaŭe vidita, aŭdita,... {\*2}

**dezir-** \* voli havi ion; voli fari ion; voli ĝui ion {\*2}

**imag-** \* vidi en siaj pensoj; formi por si mensan bildon {\*6}

**stult-** ne inteligenta; faranta aferojn malutilajn al si mem {7}

**dum** \* [daŭro]; en la sama tempo (dum la festo ni kantis) {\*1}

**tut-** \* ĉiuj partoj; ne rompita; plen-ampleksa {\*2}

**dolĉ-** \* kun gusto kiel de sukero, mielo,...; aminda {\*3}

**-ul-** \* [homo tia] (riĉulo, blindulo, mensogulo, rapidulo,...); besto laŭ ia kategorio (mamulo, rampulo,...); (foje:) ŝipo aŭ alia objekto laŭ ia kategorio (trimastulo,...) {\*0}

**bel-** \* vidinda pro formo, koloroj,... {\*2}

**long-** \* (kun granda) mezuro en unu direkto (de antaŭo ĝis malantaŭo, de komenco ĝis fino) (ankaŭ pri tempo) {\*2}

**sol-** \* sen aliaj; sen akompano; ununura {\*3}

**fakt-** \* io, pri kio ne ekzistas dubo; efektivaĵo; kontrolebla veraĵo {\*6}

**konsci-** \* scii mem pri siaj pensoj kaj agoj; bone scii, kia estas la situacio kaj kio estas la sekvoj de agoj {\*6}

**ali-** \* ne tiu; ne sama; (unu al la alia: A al B kaj B al A) {\*2}

**opini-** \* pensi ion pri io aŭ iu; pensi pri io, kia ĝi estas {\*4}

**dev-** \* ne povi ne fari, pro neceseco aŭ forta volo, aŭ pro ordono; devas esti: sendube (aŭ tre probable) estas {\*2}

**demand-** \* diri ion al iu por ekscii ion {\*2}

**salt-** \* (homo aŭ besto:) (ek)movi sin tiel, ke neniu piedo tuŝas ion (surloke aŭ de unu loko al alia); (aĵo:) moviĝi de unu loko al alia loko, ne tuŝante la lokojn inter tiuj {\*4}

**mir-** \* esti surprizita (ĉar io okazis, pri kio oni pensis, ke ĝi ne okazos aŭ ne povas okazi) {\*3}

**voj-** \* sur kio oni iras/veturas de unu loko al alia {\*2}

**simil-** \* ne tute sama, sed sama laŭ iu(j) eco(j) {\*5}

**trankvil-** \* sen timo; sen grandaj movoj; ne rapidanta {\*3}

**facil-** \* simple, sen peno, farebla aŭ komprenebla {\*2}

**dign-** Meritanta respekton: digna socia pozicioZ; nia vojo ĉiam devas esti digna kaj rektaZ.

**ĝen-** \* (iom) malhelpi al iu; ĝeni sin: ne kuraĝi, honteti {\*6}

**ekzist-** \* esti (ie en la mondo) nun kaj vere {\*5}

**-et-** \* [tre malgranda; tre malforte] (urbeto, varmeta, rideti (sen sono), ludglobeto, forketo (por torto),...) {\*0}

**ekster** \* ne en; ne inter; ekstere: (ofte:) ekster la domo {\*1}

**rol-** tio, kion devas diri kaj fari aktoro en teatraĵo; la persono en la teatraĵa rakonto, kiun devas ludi la aktoro; la funkcio, agado, posteno,..., kiun iu devas plenumi (ies rolo en la socio; ies rolo en asocio; la rolo de la patro en la familio); roli: plenumi, ludi rolon {9}

**konsil-** \* diri: "pli bone faru tiel..." {\*3}

**sinjor-** \* (alparola vorto por) viro {\*2}

**jes** \* [konfirmo] (Ĉu vi venos? Jes, mi venos.) {\*1}

**kompren-** \* havi ĝustan ideon pri la signifo {\*2}

**trov-** \* ekvidi, ekrimarki (post serĉado); (ankaŭ:) opinii {\*6}

**baldaŭ** \* post mallonga tempo {\*1}

**permes-** \* diri, ke estas bone, ke iu faros ion; diri: "mi ne kontraŭas, ke vi faru tion" {\*3}

**sincer-** sen mensogo aŭ ŝajnigo, nenion kaŝanta {7}

**reag-** Returna efiko de io, sur kion io alia agis

**depend-** pendi de io; esti subigita al ies volo/povo; ne povi fari sen ies helpo; esti la konsekvenco de io (de/pend/i) {8}

**feliĉ-** \* ĝoje kontenta; ĝoja, ĉar havas ĉion bezonatan {\*2}

**rest-** \* ne iri al alia loko; esti ne forigita; ne aliĝi; esti nefarita, nedirita, nemenciita, nemanĝita, neprenita...; esti ankoraŭ videbla aŭ trovebla poste; resto: tio, kio restas/restis/restos; tio, kio ne estas jam menciita (=la cetero) {\*2}

**ŝat-** \* havi plezurajn sentojn pro havado aŭ farado de io; havi favoran opinion pri; vidi kiel valoran; preferi {\*5}

**aŭd-** \* rimarki per la oreloj; (figure: ekscii) {\*3}

**famili-** \* patro, patrino kaj infanoj, kune (kun aŭ sen aliaj parencoj loĝantaj kun ili); parenaro {\*3}

**tamen** \* tio estas vera, sed... (Pluvas - tamen ni iru!) {\*1}

**ĉar** \* [ kialo, kaŭzo, motivo] (ĉar pluvis, ni malsekiĝis) {\*1}

**esprim-** vortigi, vortumi; montri per movoj, vizaĝo,... siajn sentojn kaj pensojn {7}

**pens-** \* havi ideojn en la kapo; labori per kapo {\*3}

**jen** \* [montro] (jen li: vidu, tie li estas) {\*1}

**montr-** \* indiki; vidigi; diri, kie io estas; elmontri: vidigi {\*2}

**-in-** \* [virino; (principe) naski-pova individuo] (virino, patrino, knabino, reĝino, ĉevalino, kokino,...) {\*0}

**prav-** \* diranta tion, kio estas vera, ĝusta {\*4}

**nepr-** \* necesega; nemalhavebla; neevitebla {\*6}

**fid-** kredi, ke iu faros bonon; kredi, ke io sukcesos; kredi, ke iu/io protektos; pensi, ke io estas certa {7}

**ĝust-** \* tiel, kiel devas esti; senerara {\*4}

**tial** \* pro tiu kaŭzo, motivo {\*1}

**ankaŭ** \* aldone [ne nur tiu/tio, sed ankaŭ tiu/tio alia] {\*1}

**kutim-** \* tio, kion oni faris, faras kaj faros same (sen devo por fari same); kutima: laŭ kutimo; en plej multaj okazoj {\*4}

**mank-** \* ne esti (kie tio/tiu devus esti); (mankas io al ĝi: ĝi ne estas kompleta; ĝi ne bone funkcias); (ĝi mankas

al mi: mi ne havas ĝin, kaj tion mi bedaŭras (ĉar mi bezonas ĝin, aŭ ĉar mi ŝatas ĝin)) {\*3}

**neces-** \* ne malhavebla por fari ion; bezonata {\*3}

**aranĝ-** \* okazigi; fari la necesajn aferojn, por ke io povu okazi; taŭge kunmeti; aranĝo: la maniero, en kiu io estas aranĝita; la rezulto de la aranĝado {\*5}

**ripar-** \* rebonigi; reuzebligi; forigi difekton {\*6}

**ŝanc-** \* ebleco de sukceso; ebleco, ke okazos {\*6}

**simpl-** \* sen komplikaĵoj; facile solvebla; unu-parta {\*3}

**mem** \* [akcentas: tiu menciita, ne alia] (mi aŭdis tion de li mem: mi aŭdis tion de li, ne de iu alia; mi mem faris tion: mi ne petis, ke iu alia faru tion, sed mi faris; la vorton mem mi ne konas, sed mi komprenas, kion ĝi signifas); [sen helpo] (faru tion mem!; memlernanto); [per si] (memĉesa moviĝo) {\*1}

**oni** \* homoj kutime, ĝenerale {\*1}

**plaĉ-** \* doni agrablan senton al iu, pro aspekto aŭ agado {\*5}

**filozofi-** Scienco pri la esencaj plej generalaj principoj kaj kauzoj de la estado.

**solv-** trovi la respondon al problemo aŭ enigmo; likvigi, miksante kun likvo (ekzemple: solvi sukeron en akvo) {\*7}

**koridor-** parto de domo, per kiu oni atingas plurajn ĉambrojn; irejo inter ĉambr(et)oj; indikita, dislimita irejo, veturejo (koridoro por ŝarĝaŭtoj, aerkoridoro por aviadiloj,...) {\*9}

**pord-** \* malfermaĵo, per kiu oni eniras kaj eliras domon aŭ ĉambron (fermebla); tio, kio fermas la eniran (kaj eliran) malfermaĵon de domo aŭ ĉambro {\*3}

**blank-** \* senkolora, tute hela; kun koloro de neĝo, kreto; (paperfolio, ĉeko:) sen skribita teksto {\*3}

**naz-** \* parto de la korpo, per kiu oni flaras (rimarkas odoron) {\*4}

**prefer-** \* ŝati aŭ voli ion pli forte, ol ion alian {\*5}

**kurac-** \* (provi) sanigi {\*5}

**odor-** esti rimarkebla per la nazo (odoron oni flaras) {\*7}

**-eg-** \* [tre granda; tre forte] (urbego, varmega, ridegi,...) {\*0}

**bezon-** \* ne povi esti aŭ fari sen {\*3}

**sekretari-** dungito (oficisto) aŭ estrarano por korespondado, protokolado,... {\*8}

**poŝt-** \* servo por transporti leterojn {\*5}

**sekret-** \* io, pri kio neniu sciis; io, kion oni rakontu al neniu; (ankaŭ:) ne ĝenerale konata bona metodo {\*6}

**uz-** \* fari ion per; preni kiel ilon aŭ rimedon {\*3}

**pren-** \* ekteni; ekhavi por si; difini por si; preni kun si: kunporti; preni kiel...: (ankaŭ:) pensi ke estas... {\*2}

**sur** \* tuŝante (supron aŭ flankon) (sur seĝo; sur muro) {\*1}

**konsider-** en pensoj esplori ĉiujn flankojn de; atenti {\*7}

**risk-** fari ion, sciante, ke povas okazi malbono {\*8}

**kompat-** \* kunsenti malfeliĉon, kiam iu alia estas malfeliĉa {\*5}

**vizit-** \* iri al iu homo aŭ loko por paroli, vidi,... {\*5}

**jun-** \* de malgranda aĝo {\*2}

**plen-** \* sen plia spaco neokupita; oni ne povas aldoni pli {\*2}

**kiom** \* [kvanto?] - (... , kiom...: [ $\leq$ ] samkvante) {\*1}

**prov-** \* fari por vidi, ĉu oni povas fari (aŭ ĉu funkcias) {\*3}

**laŭt-** forte sonanta; aŭdebla malproksime {\*7}

**apud** \* en loko proksima de...; dekstre aŭ maldekstre de... {\*1}

**ĉambr-** \* parto de domo disigita de aliaj partoj per mur(et)oj; parto de parlamento, kortumo,... {\*2}

**serv-** \* labori por plenumi la dezirojn de iu alia (servi al mastro (dunginto); servi al klientoj; servi al la publiko) {\*4}

**-ej-** \* [loko, kie] (lernejo, bakejo, loĝejo, ĉevalejo,...) {\*0}

**kelk-** \* iom da, malmulte da; kelkaj: 2, 3, 4 {\*2}

**monat-** \* 30, 31, 28 aŭ 29 tagoj; 12-ono de jaro; unu lunciklo {\*4}

**part-** \* ne la tuto, sed ligita (nun aŭ iam) al la tuto {\*3}



**kuŝ-** \* esti en horizontala pozicio (ne stari, ne sidi, ne pendi, ne iri); troviĝi senmove {\*4}

**mur-** \* fortika limaĵo inter spacoj (inter ĉambroj aŭ inter domo kaj ekstero); masonita vertikala surfaco {\*3}

**apart-** \* ne kuna; dis(igit)a de; speciala {\*4}

**dik-** \* (kun pli granda ol kutime) mezuro en neĉefa direkto (arbo dika aŭ maldika, dum la alto estas sama) {\*4}

**hazard-** kiam io okazas sen plano, intenco, volo, reguleco {9}

**lit-** \* meblo por kuŝi (kaj dormi) {\*3}

**eĉ** \* ne nur, sed ankaŭ... [neatendita, nesupozita] {\*1}

**flustr-** mallaŭte paroli (por ke ne ĉiuj aŭdu) {9}

**fleg-** \* prizorgi malsanulojn; zorge atenti {\*6}

**aŭskult-** \* provi aŭdi; uzi la orelojn; atenti ies paroladon {\*4}

**interes-** \* vekigi scivolon (ĉu en la afero estas ia utilo, profito, kono aŭ scio (por iu)); interesiĝi: esti scivola (ĉu la afero povas prezenti iel utilon,...); interesa: kio eble povas prezenti ian utilon, profiton, konon aŭ scion (por iu); scivolo-veka {\*3}

**subit-** \* tuja, sen paso de tempo; neatendita {\*6}

**streĉ-** \* plilongigi aŭ plilarĝigi per tirado; tre uzi sian korpan aŭ spiritan forton; trostreĉita: ne plu elasta {6}

**atent-** \* rimarkema; volonta ekscii {\*4}

**dub-** \* ne esti certa; ne scii, ĉu io estas vera aŭ nevera, bona aŭ malbona; ne esti certa, ĉu io okazos aŭ ne {\*4}

**daŭr-** \* kvanto da tempo, dum kiu io okazas {\*4}

**task-** certa kvanto da laboro por certa persono; farotaĵo {7}

**pet-** \* diri, ke oni deziras ekhavi aĵon aŭ servon; diri, ke oni deziras, ke iu faru ion; diri "bonvolu ...i" {\*2}

**cel-** \* tio, kion oni volas, ke okazu; tio, al kio oni volas veni; tio, kion oni volas atingi; celi: voli atingi; voli komprenigi ("kion vi celas?") {\*4}

**agent-** konstanta komisiito; komerca reprezentanto {9}

**post** \* malantaŭ; pli malfrue ol; pli malantaŭe en vico; (mi faros tion poste: ne jam nun, ne tuj); postaĵo: pugo {\*1}

**injekt-** enŝpruci likvon aŭ gason en ion; enŝpruci medikamenton en la korpon {9}

**kemi-** = ĥemio {X}

**kor-** \* parto de homa aŭ besta korpo, kiu movas sangon; (figure: fonto de sentoj); (el)kore: amike, sincere {\*2}

**bat-** \* doni forta(j)n frapo(j)n {\*3}

**prem-** \* meti manon (aŭ ion alian) sur ion kaj uzi forton (puŝi); uzi forton por malgrandigi ion {\*3}

**-em-** \* [ŝato aŭ inklino kun/sen ŝato] (ridema, babilema, dormema, kritikema, ludema, erarema, (io) rompiĝema,...) {\*0}

**rakont-** \* paroli pri okazaĵo vera aŭ imagita {\*3}

**vol-** \* (forte) deziri fari ion aŭ ke io estu farata {\*2}

**prezent-** \* montri, kiu estas iu aŭ kio estas io; vidigi aŭ aŭdigi (teatraĵon, spektaklon,...) {\*3}

**dank-** \* diri al iu, ke oni estas kontenta pri ties faro {\*3}

**saĝ-** \* kiu konas respondon al multaj demandoj pri la vivo, kaj la diferencon inter bono kaj malbono {\*5}

**perd-** \* ekmalhavi; ekhavi malprofiton, malavantaĝon {\*3}

**kamp-** \* tereno sen arbaro; (ĉirkaŭlimita) tero por kreskigo de plantoj; limoj, inter kiuj iu agas aŭ inter kiuj efikas ago (kampo de esplorado; magneta kampo; kampo de influo); kamp(ad)i: dormi ekster domo en kamparo (en tendo) {\*2}

**kapabl-** \* povanta bone fari ion; povanta bone fari multajn aferojn {\*5}

**per** \* [ilo, rimedo]; uzante; utiligante (mi tranĉas per tranĉilo; ŝi veturis per aŭto; li skribis per grandaj literoj) {\*1}

**ton-** muzika sono kun difinita alto; nuanco de voĉo; nuanco de koloro {8}

**serioz-** \* sen rido aŭ ŝerco; ne por ridi aŭ ŝerci (ĉar temas pri io grava) {\*5}  
**rigard-** \* provi vidi; uzi la okulojn {\*3}  
**pli** \* > (7 estas pli ol 6; 8 kaj 9 estas ankoraŭ pli; 3 estas malpli ol 6); pli-malpli: ne precize, proksimume {\*1}  
**ferm-** \* igi ne en- aŭ elirebla (pordon, ĉambron, sakon,...); forigi interspacon (fermi kurtenon, rondon, zonon, cirkviton, libron,...); ĉesigi, fini (diskuton, kunvenon,...) {\*3}  
**okul-** \* parto de la korpo, per kiu oni vidas (en kapo) {\*3}  
**lac-** \* sen forto post laboro; ripozema; dormema {\*4}  
**renkont-** \* vidi alian homon kaj iri al li aŭ ŝi; vidi aŭ sperti (ion) survoje, dum legado,...; renkontiĝi: renkonti unu la alian; kunveni {\*3}  
**nek** \* [ne tiu, kaj la alia ankaŭ ne] (nek hundo, nek kato estas sovaĝa besto; mi manĝis nek panon, nek kaĉon) {\*1}

## Ĉapitro 3 166 radikoj

**dek** \* 10; dudek: 20; dek du: 12; naŭdek tri: 93 {\*1}  
**kilometr-** 1000 metroj [mezuro por longo] {8}  
**volv-** \* (plurfoje) ĉirkaŭmeti ion ĉirkaŭ io alia {\*6}  
**skrib-** \* meti vortojn kaj frazojn sur (ekzemple) paperon; skribo: la literoj kaj la aspekto (latina, araba, kursiva skribo; bela manskribo,...); skribaĵo: teksto {\*2}  
**star-** \* esti en vertikala pozicio; ne iri; ne sidi, ne kuŝi {\*2}  
**kastel-** fortikigita loĝloko, domo {8}  
**sid-** \* esti en iu loko sur io, sed ne stari, kuŝi aŭ pendi {\*2}  
**admir-** opinii, ke io aŭ iu estas tre bona aŭ tre bela {8}  
**river-** \* granda natura akvo-fluo {\*4}  
**ŝton-** \* malmola natura aĵo; malgranda peco de roko {\*4}  
**aspekt-** esti laŭ (unua) rigardo; impresi al la vido {7}

**kontraŭ** \* [--> <--]; [kun mala (inversa) direkto, opinio, volo, intenco, celo]; ne por (propono); ne laŭ (regulo); [kun la antaŭo (fronto, vizaĝo, fasado) direktita al la antaŭo de la alia] (sidi kontraŭ iu ĉe la sama tablo; la kontraŭa flanko de la strato; kontraŭaj paĝoj de libro); [inversa direkto] (naĝi kontraŭ la fluo); [(provo pri) ĉesigo, haltigo, malebligo] (kuracilo kontraŭ malsano; digo kontraŭ inundo; batali kontraŭ atakanto); [movo, kiun io ĉesigas] (akcidente veturi kontraŭ arbon; ĵeti pilkon kontraŭ muron); [interŝanĝo] (ŝanĝi dolarojn kontraŭ eŭroj; manĝi kontraŭ pago); kontraŭi: esti kontraŭ, agi kontraŭ {\*1}  
**temp-** \* tio, kion oni mezuras per horoj, tagoj, jaroj {\*2}  
**milit-** \* per multaj homoj kaj armiloj batali kontraŭ malamika lando (aŭ kontraŭ enlandaj malamikoj) {\*2}  
**vojaĝ-** \* iri aŭ veturi al malproksima loko, aŭ de loko al loko (al loko...) (dum pluraj tagoj) {\*3}  
**sam-** \* ne alia; ne alispeca; identa {\*2}  
**lok-** \* tie, kie io/iu estas; spaco por io; urbo aŭ vilaĝo; loki (ion ie): meti en lokon; loka: en/pri/... (unu) certa loko {\*2}  
**vok-** \* venigi iun per (laŭta) diro; tiri ies atenton per (laŭta) diro; telefoni al iu {\*4}  
**deklar-** oficiale, publike sciigi {8}  
**firm-** \* ne (facile) ŝancebla, forpuŝebla, enpremebla aŭ malfiksebla; ne ŝanĝiĝema; konstanta; ne elasta; ne akveca {\*6}  
**preciz-** \* neniom pli, neniom malpli; tiel, kiel devas, kaj ne iomete alimaniere; precizema: kiu volas ĉion fari precize {\*6}  
**klar-** \* facile (tra)videbla, komprenebla, distingebla; sen enmiksaĵoj (akvo, vino); sennuba (ĉielo) {\*2}  
**graf-** persono havanta nobelan titolon, kiu rangas inter markizo kaj vicgrafo  
**kalv-** Perdinta la kapharojn

**mont-** \* tera altaĵo (centojn aŭ milojn da metroj alta) {\*3}  
**ĉef-** \* [plej grava] (ĉefurbo, ĉefvojo, ĉefdirektoro,...); ĉefo: superulo en laborejo; fakestro {\*0}  
**nom-** \* vorto per kiu oni povas voki iun; vorto per kiu oni indikas objekton aŭ estaĵon; interkonsentita aŭ kutime uzata vorto por io ("ni nomu tion ...", "oni nomas tion ..."); (nome: jen mi nomos, indikos tion, kion mi celas) {\*2}  
**kvankam** \* [tiel estas, sed tamen...] (kvankam forte pluvis, ni (tamen) iris eksteren (= malgraŭ la forta pluvo,...)) {\*1}  
**escept-** meti aparte kaj ne konsideri, nombri, preparoli,... {8}  
**propr-** \* de tiu/tio mem, ne de iu/io alia {\*3}  
**ĝoj-** \* havi tre bonajn sentojn pri io; esti feliĉa pro io {\*2}  
**stat-** \* tiel, kiel estas; tia, kia io estas (nun); stati: esti en iu stato (kiel statas la afero?) {\*4}  
**afer-** \* aĵo; objekto aŭ agado aŭ ideo aŭ temo {\*2}  
**kaŝ-** \* meti ion ien, tiel, ke oni ne vidas ĝin; ne preparoli; ne sciigi; teni sekrete; malkaŝi: montri/diri ion kaŝitan {\*4}  
**dom-** \* konstruaĵo; loĝejo (kun propraj eksteraj muroj) {\*3}  
**mult-** \* en granda kvanto; multaj: pli ol 4 aŭ 5; pli ol kutime; multnombro: granda nombro; pluralo {\*2}  
**kar-** \* amika, amata; (ankaŭ:) multekosta; kun alta prezo {\*4}  
**sub** \* malpli alte ol (tuŝante aŭ ne); malpli alte ol la surfaco de (sub akvo, sub tero); dependa de; regata de {\*1}  
**romp-** \* dispecigi; per (iom da) forto igi ion esti ne tuta aŭ ne ligita {\*4}  
**moŝt-** [ĝenerala titolo] (lia/ŝia/via reĝa/principina/... moŝto) {X}  
**laŭ** \* sekvante; konforme al (iri laŭ vojo; fari ion laŭ la reguloj); laŭ li,...: li diris, ke...; li pensas, ke... {\*1}  
**rimed-** \* ilo por fari ion; io bezonata por fari ion {\*3}

**ten-** \* havi (en mano aŭ proksime); ne fordoni; fari tiel, ke io/iu ne povas (de)fali, foriri, forflugi,...; restigi; (teni sian vorton: fari tion, kion oni promesis) {\*2}  
**cert-** \* [sen dubo]; difinita; bone konata (almenaŭ por la parolanto); esti certa pri.../ke...: ne dubi pri.../ke... {\*3}  
**pap-** ĉefa estro de la Rom-katolika eklezio; (figure:) iu, kies ĉiujn vortojn iuj kredas {9}  
**jam** \* (ne poste, sed jam nun; ne tiam, sed jam pli frue) {\*1}  
**man-** \* korpoparto (je fino de la brako, kun fingroj), per kiu oni povas ion preni; manilo: malfermilo sur pordo {\*2}  
**tuŝ-** \* (homoj:) meti fingro(j)n (aŭ alian korpoparton) sur ion; (aĵoj:) tiel, ke en iu loko ne estas spaco inter du aĵoj; netuŝebla: kion oni ne povas aŭ ne rajtas tuŝi (aŭ ŝanĝi) {\*4}  
**zon-** strio el ŝtofo aŭ ledo por meti ĉirkaŭ la talion; io, kio ĉirkaŭas ion alian; spaco pli-malpli difinita por certa celo {7}  
**sankt-** \* respektinda pro religio; netuŝebla {\*6}  
**ricev-** \* ekhavi de iu alia (unu donas aŭ sendas, alia ricevas) {\*2}  
**pra-** (pri parencoj:) je distanco de unu plia nasko (praavo: patro de avo; pranepo: filo de nepo); (pri tempo:) (jam de) antaŭ tre, tre longa tempo (prahistorio, praarbaro) {9}  
**patr-** \* naskiginto (en rilato al la naskigita infano) (patrino: naskintino (en rilato al la naskita infano)) {\*2}  
**memor-** \* teni en kapo; ankoraŭ scii poste {\*3}  
**konsent-** \* diri: "jes, tiel estas" aŭ "jes, tiel okazu"; havi la samajn pensojn aŭ la saman preferon {\*4}  
**corp-** \* la materia, fizika parto de homo aŭ besto (kun la kapo aŭ sen la kapo); la ĉefa parto de aĵo; tuta aĵo; (fiziko:) ĉia kunaĵo materia, kiu havas proprajn dimensiojn, pezon,... {\*4}

**ventr-** parto de la korpo, en kiu estas la stomako kaj la intestoj; antaŭa ekstero de ĝi; vasta parto de botelo,... {7}

**vizaĝ-** \* antaŭa parto de kapo, kun buŝo, nazo, okuloj {\*3}

**nask-** \* ekhavi idon; eligi idon el sia korpo {\*3}

**spec-** \* aro kun certaj ecoj, aliaj ol la ecoj de similaj aferoj {\*4}

**respekt-** \* senti estimon; ne agi kontraŭ (leĝo, kutimo,...) {\*6}

**iel** \* en iu maniero, iumaniere; en iu grado, iugrade {\*6}

**mov-** \* meti al alia loko; ŝanĝi pozicion de io/iu; agigi {\*2}

**natur-** \* ĉio, kio kreskas mem (ne kreskigata de homoj); ĉio, kio estas ne farita de homoj aŭ maŝinoj; la naturaj ecoj de io/ia {\*4}

**novaj-** io nova; priskribo, raporto pri io antaŭ ne longe okazinta; io ankoraŭ ne aŭdita aŭ legita (nov/aĵ/o) {X}

**fal-** \* rapide moviĝi de supre malsupren; renversiĝi {\*3}

**interromp-** provizore ĉesigi; diri ion, dum io alia estas parolanta (inter/romp/i) {X}

**rekt-** \* sen kurboj, sen flankeniĝoj; tiel ke du punktoj estas ligitaj per plej mallonga linio; tiel, ke la vojo estas plej mallonga; (pri angulo:) orta (90°); rekto: rekta linio {\*5}

**pardon-** \* diri: "ne estis bone, ke vi faris tion, sed nun estas bone inter ni"; ne puni ion punindan {\*4}

**zorg-** \* fari ĉion, por ke io sentu sin bone, aŭ por ke io okazu bone; pensi pri tio, kion oni devas fari, por ke...; pensi pri tio, kio povus okazi, se... {\*4}

**akcept-** \* ne kontraŭi; ne rifuzi; (ankaŭ: gastigi) {\*4}

**kuraĝ-** \* ne timanta; sentanta sin tre forta por fari ion {\*3}

**esper-** \* pensi, ke estus bone, se io okazus; kun antaŭĝojo atendi, ke io okazos; espereble: (ofte:) ni esperu, ke... {\*4}

**sufiĉ-** \* tiom, kiom necesas; tiom, ke ne necesas pli; ne tro kaj ne maltro; (sufiĉe ...a: ne malmulte ...a; ne mal...a) {\*4}

**ankoraŭ** \* ne nur antaŭe, sed ankaŭ nun; ne nur tiom, sed eĉ pli da; daŭre same; ankoraŭ ne: ĝis tiam ne; ne jam {\*1}

**aĝ-** \* kvanto de vivjaroj; aĝa: (ofte:) maljuna {\*4}

**iom** \* nedefinita (aŭ ne menciata) kvanto; (ofte:) malgranda kvanto; (iom ...a: (ofte:) relative ...a; ne tre ...a) {\*1}

**bien-** kampara posedaĵo, ofte granda {7}

**apartament-** kelkĉambra loĝejo (en pli granda domo) {8}

**loĝ-** \* daŭre restadi (en domo, urbo, lando) {\*2}

**fil-** \* vira ido (rilate al liaj gepatroj) {\*3}

**bril-** \* radii aŭ reflekti lumradiojn (brilas suno, oro,...) {\*4}

**pur-** \* tio kaj nenio alia; senmakula; lavita, balaita {\*3}

**mebl-** \* [tablo, seĝo, lito, ŝranko,...]; mebli: provizi per mebloj; meblaro: la mebloj de unu ĉambro aŭ domo {\*6}

**atmosfer-** Gasa maso ĉirkaŭanta astron, kaj interalie Teron.

**pez-** \* (science:) (forte) altirata de Tero aŭ de la planedo, kie oni troviĝas (mezurate per nutonoj); (praktike, sur Tero:) (kun granda) mezuro laŭ gramoj aŭ kilogramoj ("pezo" = "maso mezurata per pesado") {\*5}

**agrabl-** \* tiel, ke estas bona sento {\*4}

**eĥ-** ripetigo de sono pro reveno de surfaco; eĥi: resendi sonon (la montoj eĥas lian vokon - lia voko eĥiĝas) {9}

**adapt-** ĝustigi, taŭgigi por io celo, kondiĉo aŭ cirkonstanco {9}

**paper-** \* materialo, sur kiu oni skribas leterojn kaj presas librojn aŭ gazetojn; folio el tiu materialo; dokumento {\*4}

**tuk-** \* peco de teksaĵo (aŭ alia materialo), ofte kvadrata aŭ rektangula (tablotuko, littuko, buŝtuko, naztuko, kaptuko, ŝultrotuko, volvotuko, koksotuko, viŝtuko, sekigtuko,...) {\*6}

**poŝ-** \* saketo en vesto; io simila en aŭ sur io alia; poŝuloj, poŝbestoj: mamuloj, kies idoj kreskas en haŭto-poŝo de la ino, en kiu estas la cicoj (=marsupiuloj) [kanguruo,...] {\*5}

**bru-** \* fari neklarajn (malagrablajn) sonojn {\*4}

**plor-** \* malĝoji (aŭ ĝoji) tiel, ke larmoj (akvo) fluas el la okuloj {\*4}

**rond-** \* io simila al la litero "O" (kun aŭ sen truo en la mezo); kiam ĉiuj homoj (aŭ aĵoj) estas simile malproksimaj de iu centro (meza punkto); grupo, en kiu neniu estas la unua (plej grava) aŭ la lasta (plej malgrava); ronda: kun formo de (parto de) rondo, cirklo, disko, globo, sfero, cilindro {\*4}

**ruĝ-** \* kun koloro de sango {\*2}

**ter-** \* tio, sur kio estas homoj, bestoj, domoj...; tio, en kio kreskas plantoj; Tero: la nomo de nia planedo {\*2}

**pied-** \* la parto de la korpo, je fino de la kruro, sur kiu homo aŭ besto iras; simila parto, sur kiu staras objekto {\*3}

**terur-** \* grandega timo; teruri: fortege timigi iun; teruriĝi: eksenti teruron {\*5}

**labor-** \* faradi (por produkti ion, atingi ion, plenumi taskon,...); perlabori: akiri (monon) per sia laboro {\*2}

**lig-** \* kuneco; kunaĵo; tio, kio kunigas {\*4}

**ĉe** \* en loko tre proksima de; (preskaŭ) tuŝante; (preskaŭ) samtempe kun; en la domo, lando, opinio, verko,... de {\*1}

**apenaŭ** \* preskaŭ ne; ne (aŭ nur iomete) pli ol (61 minutoj estas apenaŭ unu horo) {\*1}

**port-** \* subteni pezan objekton (por ke ĝi ne malleviĝu); teni kaj movi al alia loko; havi kun si aŭ sur si {\*2}

**lum-** \* esti tre hela, brila; (suno lumas, kaj lumigas Teron; luno lumas, kaj lumigas Teron; lampo lumas kaj lumigas) {\*3}

**urb-** \* loko kun multaj (pli ol kelkmil) domoj kaj multaj homoj; urbego: kun milionoj da loĝantoj {\*3}

**kudr-** kunligi per fadeno; fari vestojn per kudrado {\*7}

**liber-** \* neligita; memdecida; kiu povas foriri, se li, ŝi aŭ ĝi volas foriri; kiu povas fari, kion li aŭ ŝi volas {\*2}

**hodiaŭ** \* en/dum la nuna tago; en/dum ĉi tiu tago {\*1}

**ceter-** \* kroma; alia; ĉiu aŭ ĉio ne dirita, ne menciita {\*5}

**ŝir-** \* distiri (paperon, ŝtofon); deŝiri: per (forta) tirado apartigi parton {\*6}

**ĝem-** esprimi dolorajn sentojn per neklaraj sonoj {\*7}

**serĉ-** \* iri kaj rigardi (ĉie) por trovi {\*3}

**real-** vere ekzistanta, ne elpensita; ne virtuala {\*9}

**bank-** ŝtata aŭ privata entrepreno okupiĝanta pri financo (mon-aferoj) (pruntoj, ĉekoj, akcioj) {\*7}

**interven-** diri ion dum diskuto (inter aliaj homoj); (sen peto) agi anstataŭ iu alia (ĉar tiu ne kapablas, por preventi akcidenton,...) (inter/ven/i) {X}

**moment-** \* tempo-punkto; malpli ol sekundo {\*4}

**komfort-** \* ne laciga; agrabla; tiel, ke oni sentas sin bone tie {\*6}

**rapid-** \* faranta/okazanta en malgranda tempo {\*2}

**rev-** imagi tion, kion oni forte deziras {\*8}

**ŝanĝ-** \* aliigi; malsamigi; preni aŭ doni alian anstataŭe {\*3}

**trans** \* je/al la alia flanko de (li loĝas trans la rivero; flugi trans la maron) {\*1}

**tabl-** \* meblo por manĝi aŭ labori, kun horizontala supra surfaco (manĝo-, vendo-, tualet-, (oficeja) skribotablo) {\*3}

**nigr-** \* senkolora, tute malhela; kun koloro de loko senluma {\*3}

**har-** \* fadenforma kreskaĵo sur la haŭto de homo aŭ de iuj bestoj (ĉe homoj multaj haroj kreskas sur la kapo,

tial pri homoj "hararo" kutime signifas "ĉiuj kapharoj kune") {\*3}

**haŭt-** \* la surfaco de homa aŭ besta korpo; la ekstera tavolo de io {\*6}

**brun-** \* kun koloro de malfreŝaj herboj aŭ malnova ligno {\*5}

**blond-** kun flavecaj haroj; (ankaŭ: blonda biero) {7}

**roz-** \* floro kvinparta, ofte ruĝa laŭ koloro (koloro "roza": hele ruĝa, pale ruĝa), de ofte dorna arbusto (Rosa) {\*4}

**krur-** \* tiu parto de la korpo, per kiu homo aŭ besto iras; malsupra membro (inter genuo kaj piedo aŭ inter kokso kaj piedo); simila parto, sur kiu staras objekto {\*5}

**mez-** \* en "abcde" c estas en la mezo; en "O", la mezo estas malplena; (meza: en la mezo; ne ekstrema) {\*4}

**ĉiel-** \* tio super ni (ekster domo), kie estas nuboj aŭ ne; (religio:) loko, kie loĝas la dio(j), paradizo {\*3}

**hezit-** ne esti certa; ne kuraĝi; ne scii, ĉu fari aŭ ne fari {7}

**delikat-** \* precize farita; rompebla; bela; bongusta {\*6}

**muzik-** \* plaĉa kombino de sonoj (sinsekvaj kaj samtempaj) de sama aŭ diversa alteco (farata per voĉo(j) aŭ per instrumento(j)); muziki: fari aŭ ludi muzikon {\*5}

**leg-** \* vidi kaj kompreni vortojn; voĉlegi: legi aŭdeble {\*2}

**amik-** \* ŝatata, kara homo {\*2}

**sign-** \* eta skribaĵo, simpla desegnaĵo, movo de mano,... donanta informon; ekkonilo; rekonilo; avertilo; ankaŭ: io, kio antaŭanonas ion; signi: doni signo(j)n; paroli per signoj; meti signon (skribaĵeton) ĉe parto de teksto,... {\*6}

**destin-** antaŭe fiksi la celon, funkcion aŭ uzon de io; antaŭe fiksi la vivon de io {8}

**modern-** laŭ la opinioj, normoj, postuloj de la nuna tempo {8}

**princip-** fundamenta veraĵo; baza elemento aŭ regulo de rezonado, scienco, moralo,...; principe: (ankaŭ:) teorie {9}

**ideal-** perfekteco neniam atingebla; nobla celo {8}

**absolut-** sendependa de ajna influo; senkondiĉa, senrezerva {9}

**katastrof-** subita, tre malfeliĉiga okazaĵo {X}

**muskol-** parto de la korpo de homo aŭ besto, el fibroj, kiu ebligas movojn en la korpo kaj de la korpo {8}

**sinten-** kondut-maniero en certa situacio; maniero de starado; (firmaj) opinioj pri iu afero (si/n/ten/o) {9}

**ofic-** \* ies difinita laboro (ne manlaboro); ofici: plenumi oficon; oficejo: loko por administra aŭ serva laboro {\*5}

**not-** \* malgranda skribaĵo pri io (por ke oni memoru pri tio); io, kion oni fiksas en sian memoron; skribsigno por muzika tono; noti: fari noton (sur papero aŭ en memoro) {\*6}

**honest-** \* ne mensoganta; parolanta la veron; faranta tion, kion oni devus fari {\*6}

**special-** \* ne ordinara; ne kutima; kun nekomunaj ecoj; ne ĝenerala; farita por aparta celo; specialisto: iu, kiu tre multe scias pri aparta temo aŭ fako {\*6}

**grav-** \* kun granda influo; kun multaj sekvoj; tre atentinda {\*2}

**propon-** montri ion por uzo (aŭ por manĝado, trinkado, aĉeto, vendo); diri al iu, ke tiu eble faru ion {9}

**garanti-** preni sur sin la respondecon pri iu/io; certigi, ke io okazos (riskante punon aŭ pagon, se tio ne okazos) {8}

**tir-** \* uzante forton, movi al si (aŭ kun si); fari, ke io sekvas: ĉevalo tiras ĉaron; retiriĝi: cedi, reiri {\*3}

**evident-** klara por ĉiuj; konata al ĉiuj; memkomprenebla {7}

**kondiĉ-** \* io, kio devas esti farita antaŭ ol io alia povas esti farata; cirkonstanco influanta al agado; kondiĉi: prezenti kondiĉon; postuli (en kontrakto) {\*6}

**krom** \* [aparta mencio] ne nur ... sed ankaŭ aliaj (krom pano, ni manĝas (ankaŭ) rizon); ĉiuj aliaj, sed ne ... (krom rizo, ĉiuj grenoj kreskas sur seka tero); krome: aldone, plie; kromnomo: alia nomo ol la oficiala aŭ kutima nomo {\*1}

**profesi-** okupo por vivteni sin (kutime: salajrata laboro) {8}

**valor-** \* graveco; dezirindeco; grandeco de kosto; ŝatateco; utileco; valori: havi (grandan, iun) valoron; havi meriton {\*3}

**ekzempl-** \* io, kion oni imitu; unu el similaj (se oni vidas ĝin, oni povas imagi la aliajn) {\*4}

**hont-** \* havi malbonan senton pro farado aŭ pensado de io malbona, malbela, malhonora,... aŭ pro nefarita devo {\*6}

**reciprok-** de unu al la alia kaj de la alia al tiu unu {8}

**komunik-** sciigi; konigi; transdoni (mesaĝon, fajron, malsanon); komunikiĝi: sciigi, paroli,... unu al la alia {7}

**koncern-** speciale rilati al; havi gravecon por {7}

**taŭg-** \* tute bona por iu celo {\*6}

**ge-** \* [la du seksoj kune] (geknaboj, gefiloj, gesinjoroj,...) {\*0}

## Ĉapitro 4 39 radikoj

**blu-** \* kun koloro de ĉielo sennuba {\*4}

**bird-** \* besto dukrura kun flugiloj, kun plumoj, ovo-naska (Aves) [anaso, korvo, hirundo, aglo, struto,...] {\*3}

**kant-** \* muzike paroli; kanto: vortoj kaj melodio kantataj {\*3}

**aer-** \* la gasoj ĉirkaŭ ĉio en la tuta mondo; la gasoj, kiujn ni spiras por vivi; tio, en kio flugas birdoj, insektoj {\*4}

**maten-** \* komenco de tago post nokto; lumiĝo {\*3}

**pal-** senkolora; kun malforta koloro {7}

**traf-** \* sukcesi atingi lokon celitan; kiam ĵetita ŝtono aŭ pilko aŭ pafita kuglo atingas la punkton, kiun oni volas, ke ĝi atingu; suferigi; sukcesi renkonti; hazarde renkonti {\*5}

**difin-** precize, sendubige klarigi aŭ priskribi ideon, vorton, taskon,..., menciante ecojn, kiujn ĝi havas kaj ne havas {7}

**duon** Unu el la du egalaj dividoj de tuto

**gard-** \* atenti kaj fari ĉion por ke ne okazu io malbona al iu/io; gardilo: (ankaŭ:) kiu interrompas elektran cirkvitojn {\*5}

**reprezent-** laŭ peto aŭ ordono anstataŭi iun; laŭ peto fari ion en la nomo de; (ankaŭ: re-prezenti: montri denove) {7}

**ties** de tiu(j); apartenanta al tiu(j) {9}

**met-** \* [starigi, kuŝigi, pendigi]; surmeti: (ekz. vestaĵon) {\*2}

**film-** bendo kun bildoj projekcieblaj; bendo sur kiun oni faras bildojn projekcieblajn aŭ fotojn; rakonto fotografita per moviĝantaj bildoj; filmi: fotografi moviĝantajn bildojn sur filmo (aŭ sur magneta bendo, disko,...) {7}

**mirind-** tia, ke oni vere povas miri pri ĝi (mir/ind/a) {9}

**preskaŭ** \* ne tute, ne plene; iomete malpli ol (59 minutoj estas preskaŭ unu horo); ne mankas multe {\*1}

**oft-** \* okazanta multfoje; en multaj tempoj; ĉiam denove {\*2}

**kis-** \* tuŝi iun per la lipoj por esprimi amon aŭ respekton {\*6}

**buŝ-** \* parto de la kapo per kiu oni manĝas kaj parolas {\*3}

**rajt-** \* tio, kion neniu povas malpermesi; rajti: havi rajton (pri io, por fari ion); havi (jure validan) permeson; rajtigi: doni rajton; (jure valide) permesi {\*3}

**vast-** \* (kun granda) mezuro en pluraj direktoj {\*5}

**ĥerc-** \* diri, rakonti ion lude, ridige {\*6}  
**efektiv-** \* vera; ne ŝajna; ekzistanta; reala {\*5}  
**dokument-** oficiala papero, skribaĵo; skribaĵo uzata por pruvi aŭ atesti ion; dokumenti: atesti, pruvi per skribaĵo(j) {9}  
**radi-** \* linioforma aĵo komenciĝanta en iu centro; ero de lumo aŭ sono aŭ alia signalo venanta el iu centro; aparato, kiu aŭdigas sonojn, kiuj alvenis al ĝi kiel elektromagneta signalo el iu centro (=radio-ricevilo); radii: eligi radiojn (de lumo, varmo,...); klare montri varman senton (ĝojon,...) {\*5}  
**student-** studanto en alta lernejo, en universitato {8}  
**divers-** \* kun malsamaj ecoj {\*4}  
**produkt-** \* aĵo farita de homo aŭ maŝino; la rezulto de iu laboro; produkti (ion): fari el krudaj materialoj substancon aŭ objekton utilan; estigi {\*5}  
**tabak-** materialo por fumado, el sekigitaj folioj de tabakplanto (*Nicotiana tabacum*,...) {7}  
**fum-** \* varma aero, gasoj kaj malpuraĵoj, kiuj de fajro iras en aeron {\*6}  
**plezur-** \* agrabla, ĝoja, gaja sento; plezuri: senti, havi plezuron; plezurigi: havigi plezuron {\*4}  
**fart-** esti en (bona aŭ malbona) sanstato; senti sin (bone aŭ malbone) pro (mal)sano aŭ aliaj cirkonstancoj {7}  
**manĝ-** \* enbuŝigi (enstomakigi) por vivi {\*3}  
**bild-** \* videblaĵo (vera aŭ desegnita, pentrita, fotita, projekciita); kvazaŭ-videblaĵo nur en pensoj {\*3}  
**lev-** \* suprenigi; preni de tero kaj teni super tero {\*2}  
**invit-** \* peti iun veni ien (se li aŭ ŝi volas veni tien); peti iun fari ion (se li aŭ ŝi volas fari tion); peti sen devigo {\*5}  
**plan-** antaŭe pripensita aranĝo de io farota; desegno de tio; desegno de urbo, kun indiko de domoj kaj stratoj kaj interesaj aŭ gravaj konstruaĵoj (=urbomapo); plani: fari planon por fari ion aŭ por io konstruota {7}

**adres-** \* [strato, numero, urbo, lando]; adresi: surmeti adreson; direkti (leteron, parolon) al... {\*5}  
**pag-** \* doni monon (por ricevi ion (objekton, servon,...) aŭ pro devo); enpagi (al konto/kaso); elpagi (de konto/kaso) {\*3}

## Ĉapitro 5 47 radikoj

**brak-** \* elstara parto de homa korpo, je kies fino estas mano; elstara movebla parto de aparato {\*4}  
**seĝ-** \* meblo por sidi (por unu homo) (en formo de la litero "h"); (ankaŭ: seĝo en parlamento); brakseĝo: fotelo {\*4}  
**motiv-** io, kio igas iun agi aŭ konduti tiel aŭ tiel; malgranda parto de muzikaĵo, kiel bazo de pli grandaj partoj aŭ kun aparta signifo; (ripetata) desegnaĵo (sur muro, en ŝtofo,...); motivi: prezenti motivo(j)n por agado aŭ konduto {X}  
**ĉirkaŭ** \* je ĉiuj flankoj de...; proksimume {\*1}  
**koler-** \* emociiĝi pro malkontento; emocie vidigi kaj aŭdigi sian fortan malkontenton {\*4}  
**social-** rilata al la bonfarto de la ŝtatanoj; rilata al la komunaj ekonomiaj interesoj de la socio (kontraste al la politikaj interesoj) {9}  
**-er-** \* [fragmento, peco da] (sablero, akvero, lignero,...) {\*0}  
**flank-** \* dekstra aŭ maldekstra, antaŭa aŭ malantaŭa parto, surfaco aŭ rando; korp parto inter brako kaj kokso {\*2}  
**form-** \* videbla, palpebla ekstera aspekto (bela, taŭga, kvadrata, ronda, anguleca,...); formi: doni formon; konsistigi; form(uj)o: en kio io mola ekhavas formon {\*2}



**mens-** la pensanta parto de la spirito (ne la sentemo); intelekto {9}

**prezid-** ordigi, gvidi diskutadon; gvidi la estraron de organizaĵo; (iuj gvidantoj de ŝtatoj havas la titolon "prezidento" anstataŭ "prezidanto") {7}

**rezult-** \* esti la sekvo; esti la fina stato {\*6}

**inteligent-** kiu facile komprenas kaj vigle pensas {8}

**pozitiv-** jesa, akcepta, permesa, konsenta, faciliga, avantaĝa, plusa {X}

**angul-** \* spaco inter du sin tuŝantaj linioj aŭ muroj (>, <) {\*4}

**impres-** influo al la sensoj aŭ al la koro; sento aŭ imago ekhavita de aŭ pri io/iu; impresi: fari impreson {8}

**-aĉ-** [malbona, malbela] (precipe laŭ ekstera aspekto) (fikaj -aĉ-: fihundo estas nefidinda kaj eble neatendite mordas - hundaĉo malbele aspektas kaj eble tro bojas) {9}

**publik-** \* tiuj, al kiuj iu parolas; tiuj, kiuj rigardas teatraĵon, ĉeestas sportkonkuron, vizitas muzeon,...; la homoj ĝenerale; publika: por ĉiuj, kiuj volas aŭdi, utiligi, ĉeesti,...; publikigi: publike anonci; aperigi en presa formo (en/kiel libro, en gazeto,...) por ke la publiko povu legi ĝin {\*6}

**ŝtel-** \* forpreni ion ne sian (sen pago aŭ permeso) {\*5}

**des** [proporcio] (ju pli multaj estas la manĝantoj, des malpli grandaj estas la porcioj; ju pli da homoj, des pli da plezuro; ju pli da infanoj, des pli da zorgoj) {7}

**fuŝ-** malbonigi ion aŭ malbone fari ion, pro senzorgeco (laŭvola aŭ ne laŭvola) {9}

**konfirm-** (ankaŭ) diri: "jes, tiel estas" aŭ "vi/li/ŝi/ili pravas"; (plie) certigi, ke io estas vera {8}

**cirkonstanc-** io, kio estas aŭ okazas en la ĉirkaŭaĵo, kiam oni faras ion aŭ kiam io okazas {8}

**aĉet-** \* havigi al si per mono; subaĉeti: korupti {\*3}

**verŝajn-** kio ŝajnas esti vera kaj probable estas vera (ver/ŝajn/a) {X}

**sav-** \* eldanĝerigi {\*6}

**danĝer-** \* kio povas esti malbona; kio povas kaŭzi malfeliĉon; kio povas eĉ kaŭzi morton {\*5}

**ĵet-** \* per forto (tra aero) meti ien {\*3}

**akv-** \* tio, en kio naĝas fiŝoj; la plej ofta likvo sur Tero (H<sub>2</sub>O); loko kie estas multe da H<sub>2</sub>O kune {\*3}

**naĝ-** \* movi sin en akvo {\*6}

**ambaŭ** \* la du; tiuj du {\*1}

**frukt-** \* parto de planto, kiu enhavas semojn [citrono, pomo, banano, oranĝo, vinbero,...] {\*3}

**restoraci-** ejo, kie oni povas manĝi kontraŭ pago {7}

**forges-** \* ne memori; perdi el memoro; ne pripensi {\*4}

**tag-** \* kiam estas lumo de la suno; 24 horoj (=tagnokto) {\*2}

**sun-** \* nia stelo, ĉirkaŭ kiu rondiras Tero {\*3}

**konstat-** rimarki, ke io estas fakto {7}

**tromp-** \* intence erarigi; kredigi, ke io estas alia, ol tio estas {\*6}

**komedi-** ridiga, amuza teatraĵo {9}

**lud-** \* fari ion ne pro utilo, sed nur por plezuro aŭ lertiĝo; sonigi muzikilon; prezenti rolon (en teatraĵo) {\*4}

**rimark-** \* ekkonscii (ke io okazas, ke io estas ia,...) {\*3}

**amator-** ne-profesiulo; iu, kiu faras ion ne por vivteni sin, sed por sia (granda) plezuro {9}

**teatr-** domo, kie oni prezentas spektaklojn (aktorado, kantado, dancado,...); teatraĵo: porteatra verkaĵo; spektaklo {8}

**grup-** \* (malgranda) aro da homoj, bestoj aŭ aĵoj; grupigi: kunigi en grupon; grupiĝi: fariĝi grupo {\*5}

**perfid-** mallojale endanĝerigi; trompe fari ion kontraŭ la atendoj aŭ la intereso de iu {8}

**lern-** \* enmeti ion novan en sian kapon; legi kaj ekzerci por ekscii ion novan; apliki spertojn en sia posta vivo {\*2}

**partopren-** ĉeesti kaj kunfari (ekskurson, kongreson, diskuton,...); fari ion kune kun aliaj homoj (part/o/pren/i) {X}

## Ĉapitro 6 71 radikoj

- ord-** \* kiam io estas aranĝita en regula, ne hazarda maniero; ---:---:---:--- estas ordo, -:---:---:--- ne estas ordo; ordigi: fari ordon; aranĝi laŭ iu ordo {\*4}
- harmoni-** kombino de sonoj agrabla por aŭskulti; plaĉa aranĝo de la partoj de tuto; harmonii: esti en harmonio {9}
- ŝultr-** parto de korpo inter la kolo kaj la supra artikolo de brako; tiu artikolo {7}
- mister-** afero kaŝita aŭ neklarigebla {8}
- deven-** origino (de/ven/o) {X}
- ĉeval-** \* besto kvarpieda por rajdi aŭ tiri (Equus) (henas: "hi-hi") {\*3}
- rajd-** sidi sur iranta besto (ĉevalo, azeno, kamelo,...); sidi sur biciklo kaj veturi; movi sin kvazaŭ rajdante sur besto {7}
- promen-** \* (piede) iri por plezuro {\*5}
- substanc-** speco de materio, rigardata laŭ ĝiaj ecoj (peza, kolora, knedebla, brulema,... substanco) {9}
- vend-** \* doni kontraŭ mono; proponi kontraŭ mono {\*4}
- ŝtat-** \* lando kiel regado-sistemo ("lando" estas ĝenerale uzata vorto, "ŝtato" kaj "regno" estas politikaj terminoj) {\*5}
- ŝpion-** Homo sekrete observanta ies farojn
- konfidenc-** informo, kiu restu sekreta, ne publika {9}
- praktik-** \* la farado, ne la teorio; praktiki: fari ion praktike {\*6}
- aplik-** uzi teorion en la praktiko; uzi ion por ĝia celo; ligi iun diraĵon al iu, pri kiu la diraĵo origine ne temis {9}
- kvant-** tiom, kiom estas (tiom da ekzempleroj, tiom da gramoj da..., tiom da litroj da..., tiom da metroj da...) {7}
- dorm-** \* ne agadi, esti neaktiva (dum nokto); kuŝi senage kun fermitaj okuloj {\*3}

- karakteriz-** Montri, difini la karakteron de io
- ŝrank-** \* meblo (plejofte kun bretoj), fermebla per pordo(j) por konservi aferojn (meblo kun bretoj sen pordo: bretaro) {\*6}
- pend-** \* esti fiksita supre, sed krome ne; esti fiksita vertikale; pendigi: fiksi tiel; pendumi: ekzekuti kondamniton, pendigante lin per ŝnuro ĉirkaŭ la kolo {\*5}
- elekt-** \* preni aŭ tion aŭ tion alian; fari tion aŭ tion alian; difini (per voĉdonado), kiu aŭ kiuj ekhavas certan oficon {\*4}
- spegul-** \* glata brila surfaco, resendanta lumon; glata objekto, en kiu oni povas vidi sin; speguli: resendi bildon; turni bildon dekstre-maldekstren {\*6}
- perfekt-** tute tia, kia ĝi devas esti; senmanka {8}
- peruk-** Artefarita hararo imitanta naturan kapharon.
- sub-** \* malpli alte ol (tuŝante aŭ ne); malpli alte ol la surfaco de (sub akvo, sub tero); dependa de; regata de {\*1}
- postul-** \* firme diri: "mi volas havi tion!" aŭ "faru tion!"; fari aŭ kaŭzi, ke io estas nemalhavebla; necesigi {\*3}
- ek-** \* [(subite) komenci] (ekridi, ekdormi, ekparoli,...); [tre mallonga ago] (ekbrilo, ekkrii, ektimi,...); ek! = startu! {\*0}
- komplet-** ĉiuparta; ne mankas parto; ne mankas kvanto {8}
- deten-** igi iun ne fari ion (de/ten/i); (sin deteni: ne fari ion; ne enmiksiĝi; ne voĉdoni) {9}
- eksplod-** subite, forte plivastiĝi; subite, forte diskrevi (pro interna premo) (ekzemple: bombo eksplodas) {8}
- larg-** \* (kun granda) mezuro alie ol laŭ longo aŭ alto; kun sufiĉe da spaco {\*4}
- art-** \* difinita maniero por fari ion (belan); maniero por lerte fari ion; la farado de io pro ĝia beleco (=belarto); (artefarita: farita de homo aŭ maŝino, ne natura) {\*3}
- arb-** \* alta planto kun ligna trunko kaj multaj branĉoj [kverko, abio, betulo, fago, tamarindo,...] {\*3}

- drog-** dependiga stimula/malstimula substanco [tabako, kafo, alkoholo, kokaino,...]; (antaŭe: natura medicinaĵo) {X}
- halt-** \* ĉesi moviĝi, iri, agi; interrompi sian iradon aŭ veturadon; (provizore) ne plu iri aŭ veturi; haltejo: loko, kie kutime haltas trajno, tramo, aŭtobuso,... {\*3}
- mask-** artefarita vizaĝo (por festo, protekto,...) {X}
- pistol-** Malgranda, facile portebla pulvopafilo, tenata per unu mano dum pafado
- konduk-** \* montri vojon kunirante; kunirigi; veturigi {\*4}
- horloĝ-** \* mezurilo de tempo; objekto, kiu montras la horon kaj la minutojn (per montriloj aŭ per ciferoj) {\*5}
- brul-** \* esti konsumata de fajro (fajro bruligas ĝin); bruligi: (ankaŭ:) vundi per varmego; brulo: (ankaŭ:) akra jukado {\*3}
- cigar-** tabako volvita en tabakfolio, por fumi {9}
- fru-** \* antaŭ la kutima aŭ fiksita tempo; je la komenco {\*3}
- lun-** \* natura satelito de planedo; Luno: la natura satelito de Tero (ĝi lumigas (ne ĉiam) la teron dum la nokto) {\*5}
- stel-** \* luma objekto en nokta ĉielo, malproksima suno; figuro kun elstaraj pintoj (kvinpinta, sespinta,... stelo); iama mon-unuo en la Esperanto-movado {\*5}
- somer-** \* parto de jaro inter printempo kaj aŭtuno, kiam estas varme {\*4}
- kur-** \* tre rapide iri; seninterrompe flui {\*3}
- best-** \* vivanta estaĵo povanta movi sin de unu loko al alia (ne homo, ne planto); (homoj kaj bestoj estas animaloj) {\*4}
- mil** \* 1000; dumil: 2000; mil du: 1002; dumil okcent: 2800 {\*1}
- tiam** \* en tiu tempo; en tiu momento {\*1}
- pas-** \* ne resti; ne halti; preteriri sen halto; trairi sen halto; iom post iom malaperi aŭ ne plu okazi (la semajno pasis sen gravaj okazaĵoj; la pluvo pasis); pasigi: irigi de loko al loko sen halto; igi (tempon) pasi, farante ion (kie vi pasigis vian libertempon?) {\*3}
- hor-** \* 60 minutoj [mezuro por tempo]; (la horo: la (nuna) punkto en tempo: kioma horo estas? la dua kaj duono) {\*3}
- etos-** komuna sento, pro estado en iu grupo aŭ pro la ĉirkaŭaĵo {X}
- transform-** Doni alian formon
- generaci-** aĝogrupa; ĉiuj homoj proksimume samaĝaj vivantaj samtempe; nasko-ŝtupo (geavoj - gepatroj - gefiloj - genepoj -...) {9}
- hejm-** \* la propra aŭ familia loĝejo; famili(ec)a restadejo {\*3}
- sven-** (dum mallonga tempo) perdi la konscion kaj la kapablon movi sin {8}
- furioz-** (ne sinrege) kolerega {9}
- indik-** doni la informo(j)n bezonata(j)n (por fari ion, trovi vojon,...); montri ion farotan; montri iun por ke li/ŝi faru {9}
- inter** \* [a bc: b estas inter a kaj c]; [ash3dj]mtuvp: cifero inter literoj]; (rilatoj inter A kaj B: rilatoj de A al B kaj de B al A) {\*1}
- sek-** \* senakva, senlikva; sen agrabla aldonaĵo (vino,...) {\*5}
- raport-** rakonti (buŝe aŭ skribe) pri tio, kio okazis {8}
- detal-** ero, malgranda parto de io (plano, bildo, teksto,...) {8}
- konsekvenc-** tio, kio neeviteble sekvas al io {9}
- varm-** \* kun relative alta temperaturo; (fajro: varmega) {\*3}
- sum-** \* [8 estas la sumo de 3 kaj 5, aŭ de 1, 3 kaj 4]; kvanto da mono (ekzemple: la sumo pagenda); sume: ĉio kune; sumigi: adicii la tuton {\*5}
- obl-** \* [kvanto; fojoj: triobla=3x] (duobla papero, duoble diri ion, la duoblo, duobligi,...); (mult)obligi: igi

multoble tiel multaj; (matematiko:) kalkuli oblon  
( $3 \times 4 = 12$  tri oble kvar estas dek du) (=multipliki) { \*0 }

**klik-** sono de eta bato

**glas-** \* vitra trinkujo (vinglaso, akvoglaso,...) { \*4 }

**botel-** \* (vitra) ujo kun malvasta malfermaĵo { \*6 }

**brand-** forta (35% aŭ pli) alkohola trinkaĵo { 9 }

**ĉantaĝ-** Trudpostuli de iu monon aŭ favoron per  
skandalminaco

## Ĉapitro 7 16 radikoj

**kri-** \* tre forte, tre laŭte, tre akre diri aŭ voki { \*3 }

**humur-** Nemalica ŝercemo, kun milda aŭ nenia moko,  
celanta precipe amuzon

**ĵurnal-** ĉiutaga gazeto; ĉiutaga (aŭ pli ofta) raporto pri  
novaĵoj; konto-folio aŭ -libro pri ĉiutagaj en- kaj  
elspezoj { 8 }

**aventur-** danĝera aŭ plezura (neatendita) vico da okazaĵoj  
{ 7 }

**pseŭd-** Falsa, nur saĝna, neautenta

**fi-** [malbona, malica, malnobla] (precipe pri karaktero) (fi-  
kaj -aĉ-: fihundo estas nefidinda kaj eble neatendite  
mordas - hundaĉo malbele aspektas kaj eble tro  
bojas) { 9 }

**insist-** daŭre, ripete kaj firme esprimi sian opinion (aŭ  
peton) al aliaj { 8 }

**sindikat-** asocio de personoj aŭ societoj, por defendi  
komunajn ekonomiajn interesojn (de laboristoj, de  
fabrikistoj,..) { 9 }

**band-** Eta grupo facile moviganta

**fort-** fotografaĵo; foti: fotografi; fotilo: foto-aparato { X }

**last-** \* neniu aŭ nenio estas post tiu; mal-unua { \*2 }

**estim-** \* pensi pri iu, ke li aŭ ŝi faras bone kaj estas bona  
homo { \*5 }

**strik-** ĉesigi laboron kiel protesto aŭ por atingi celon { 8 }

**salajr-** (ĉiusemajna, ĉiumonata) pago al homo pro farita  
laboro { 7 }

**barb-** \* hararo sub la buŝo; flankbarbo: apud orelo { \*6 }

**vic-** \* pluraj homoj aŭ objektoj, en unu linio metitaj, unu  
post la alia (unu apud la alia aŭ unu malantaŭ la alia);  
pluraj sinsekvaj okazaĵoj { \*6 }

## Ĉapitro 8 14 radikoj

**miks-** \* kunigi (unu tra la alia) per movoj (per skuado, per  
kirlado,...); (inter)miksi: (figure:) konfuzi { \*6 }

**just-** \* faranta egale bone al ĉiuj homoj { \*4 }

**sen-** \* ne havante; ne uzante; ne kun (li iris sen ŝuoj; mi  
ne bone vidas sen okulvitro; kafo sen lakto) { \*1 }

**punkt-** \* tre malgranda loko (en spaco aŭ tempo); aparta  
(malgranda) parto de teksto aŭ argumentado; la  
signo "." { \*3 }

**region-** \* parto de lando kun certaj (naturaj aŭ sociaj) ecoj  
{ \*5 }

**tas-** \* trinkujo sufiĉe malalta, kun larĝa malfermaĵo, ofte  
kun anso (tenilo); subtaso: telereto sub taso { \*6 }

**kaf-** \* bruna aŭ nigra trinkaĵo (kuirita aŭ filtrita), el muelitaj  
rostitaj semoj de la kafarbo (Coffea) { \*5 }

**sku-** abrupte, subite, rapide movi tien kaj reen  
(maldekstren kaj dekstren; antaŭen kaj malantaŭen;  
supren kaj malsupren); forte tremigi { 8 }

**tekst-** aro da vortoj kaj frazoj; skribaĵo { 9 }

**kravat-** \* mallarĝa tuko, kiun iuj (viroj) ligas ĉirkaŭ la kolon  
{ \*6 }

**ŝut-** elglitigi mult-eran nelikvan substancon (sablon, ŝtonetojn, grenon,...); grandkvante send(ig)i datenojn {8}  
**arest-** (laŭ leĝo) kapti iun por malliberigi tiun aŭ por submeti tiun al juĝado {X}  
**semajn-** \* 7 tagoj {\*3}  
**teror-** regado (aŭ provo ekregi) per (ne-antaŭdirebla) krueleco, terurante la popolon; teroristo: iu, kiu provas atingi iun celon per ne-atendita(j) kruela(j) atako(j) al senkulpaj homoj {X}

## Ĉapitro 9 26 radikoj

**plur-** \* pli ol unu (aŭ du); ne nur unu {\*6}  
**profit-** utilo aŭ mongajno ricevita el aŭ pro io; kiam la enspezoj estis pli grandaj ol la elspezoj; profiti: ricevi utilon, mongajnon el io {8}  
**mis-** \* [ne ĝuste; erare] (misprononci, misaŭdi, miskalkuli, miskompreni, mistraduki, mispaŝi, misgluti,...) {\*0}  
**trans-** \* de unu (flanko, loko, persono, stato) al alia (ne apuda, tute alia) (transiri, transmeti, transporti, transsendi, transdoni, transformi, transskribi, transkonstrui,...) {\*1}  
**urĝ-** rapidigi, vigligi; esti neprokrastebla {7}  
**dolor-** \* tre malbona (korpa) sento (kiam oni forte falas, tranĉas sin,...); dolori: (interne) sentigi doloron (post tiu falo, lia genuo doloras); dolorigi: (de ekstere) kaŭzi, ke io doloras (dolorigi per frapo) {\*4}  
**super-** \* pli alte ol (ne tuŝante); supersigno: signo super litero (ekzemple: "^"); supera: pli alta, pli bona {\*1}  
**kulp-** \* kiu (konscie) faris ion malbonan {\*5}  
**anstataŭ** \* en la loko de...; en la funkcio de... (anstataŭi: esti aŭ funkcii anstataŭ io/iu alia; anstataŭigi (la

nunan per nova): meti ion/iun alian anstataŭ la nuna...) {\*1}

**demokrati-** kiam la politika povo en ŝtato efektive apartenas al la popolo (rekte aŭ per reprezentantoj) {X}

**iam** \* en nedefinita (aŭ ne menciata) tempo; ne nun {\*1}

**obe-** \* fari tion, kion iu ordonas aŭ instrukas {\*6}

**konstant-** \* neŝanĝiĝanta; daŭre sama {\*6}

**kompens-** doni ion por anstataŭi perdon; doni aŭ okazigi ion plezuratan, ĉar okazis malplezuraĵoj; pagi (ankaŭ ne per mono) pro ies penoj {9}

**aŭt-** aŭtomobilo (ekz.: person-, ŝarĝ-, liver-aŭto) {8}

**ŝlos-** \* firme fermi per ilo (turnante ŝlosilon en seruro) {\*5}

**orel-** \* parto de la korpo, per kiu oni aŭdas (rimarkas sonojn); orelkonko: la ekstera parto de la orelo {\*4}

**plank-** \* malsupra ebenaĵo de ĉambro; tio, sur kio oni iras en domo {\*4}

**tuj** \* senprokraste; senatende; post tre malgranda tempo {\*1}

**sonĝ-** vidi kaj aŭdi kaj travivi aferojn dum dormo {7}

**sekund-** 60-ono de minuto [mezuro por tempo] {7}

**boks-** Arto, sporto de pugnolukto.

**lingv-** \* ĉio, kion homoj diras (malsama en malsamaj lokoj); skribaĵoj kaj paroloj, per kiuj homoj komprenas unu la alian; nacilingva: ne en Esperanto {\*3}

**sonor-** sono postsonanta (ne rapide ĉesanta); sonori: estigi sonoratan sonon; sonorigi: frapi/funkciigi sonorilon {7}

**dekstr-** \* (ĉe homo:) ne je la flanko de la koro (Esperanton oni skribas de maldekstre dekstren) {\*3}

**metod-** pripensita aro da manieroj por atingi iun celon {8}

## Ĉapitro 10 4 radikoj

**enket-** oficiale esplori (pri krimo,...); larĝskale pridemandi (pri difinita demando aŭ temo) {9}

**mesaĝ-** sciigo; informo sendata de unu persono al alia(j) {X}

**suspekt-** sen pruvo pensi, ke io malbona okazis aŭ ke iu faris ion malbonan {8}

**dispon-** havi ion por uzi ĝin laŭ sia volo {9}

## Ĉapitro 11 29 radikoj

**konsist-** \* esti kunmetita (el kiu partoj, eroj, kiu materialo) {\*6}

**pan-** \* manĝaĵo bakita el knedita fermentinta pasto {\*4}

**ktp** kaj tiel plu

**sistem-** tutaĵo da interdependaj ideoj (aŭ aparatoj) kunordigitaj; sisteme (fari ion): laŭ plano, paŝon post paŝo {8}

**dediĉ-** (mane) enskribi en libron specialajn vortojn por la ricevonto; (presite) mencii, ke libro aŭ poemo estas verkita por (ofte fakte: honore al) iu; uzi preskaŭ ĉiun sian tempon aŭ forton por iu celo {8}

**egal-** \* tute sama; kun la samaj ecoj, mezuroj,...; same (mal)bona, (mal)utila, (mal)granda,...; same (mal)grava, (mal)interesa,...; (egalblua: ĉie same blua); egalas: "=" {\*5}

**util-** \* bona por esti uzata; bona por atingi rezulton; utili: alporti utilon; utiligi: uzi ion tiel, ke ĝi estas utila {\*4}

**karaf-** larĝa botelo; vitra kruĉo {9}

**suk-** likvo, trinkaĵo el frukto(j) (aŭ el alia parto de planto),... {7}

**soif-** \* bezoni trinki {\*6}

**rifuz-** \* diri "ne"; ne voli havi, ricevi, fari {\*6}

**esplor-** rigardi, por malkovri ion nekonatan aŭ kaŝitan {7}

**supr-** \* tiu parto de io, kiu estas plej alta, plej malproksima al tero aŭ planko; supre: en pli alta parto {\*4}

**prepar-** \* fari tion, kio estas necesa por povi komenci fari ion; fari ion taŭga por iu celo (ekz. legomojn por manĝo) {\*5}

**apar-** pli-malpli granda, pli-malpli komplika ilo {7}

**membr-** ano, aliĝinto de klubo, asocio, societo,...; elstara parto de korpo [brako, kruro] {7}

**fenestr-** \* truo en muro (kun vitro) por tralasi lumon aŭ por trarigardi; fako sur komputila ekrano {\*3}

**malgraŭ** eĉ se tio aŭ tiu malhelpus (malgraŭ la forta pluvo, ni (tamen) iris eksteren (= kvankam forte pluvus,...)) {7}

**frap-** \* (subite) forte tuŝi per mano aŭ io alia {\*4}

**ĝentil-** \* bone kondukanta laŭ ĝenerale akceptataj normoj, laŭ socie akcepteblaj "bonaj manieroj" {\*6}

**fak-** \* parto de kesto aŭ ŝranko, apartigita per septoj (vandoj) de aliaj fakoj; dividaĵo de surfaco apartigita per linioj de aliaj fakoj, ekzemple de ŝak- aŭ dam-tabulo; temaro por lerni aŭ studi, apartigita de aliaj temaroj; temaro kiun iu lernis aŭ studis (por sia laboro); laboro, por kiu necesas lerni aŭ studi certan temaron {\*6}

**-ar-** \* [multaj kiel unu tuto] (arbaro, ŝtuparo, gazetaro, homaro, ilaro (de metiisto),...); aro (da): multaj kune {\*0}

**libr-** \* frazoj sur papero: multaj paĝoj kune (binditaj) {\*3}

**aldon-** doni ion plian (krom tio, kion oni jam donis al iu, aŭ krom tio, kio jam estas ie); diri aŭ skribi ion plian (al/don/i); aldona: kroma; plia; ekstra {X}

**fingr-** \* movebla elstara parto de mano aŭ piedo {\*3}

**fajr-** \* brulado kun flamoj (iuj el la aĵoj mem ekbrulis) {\*4}

**kontrol-** esplori, ĉu io estas tia, kia ĝi devas esti {8}

**fulm-** brila fajra streko en ĉielo pro elektro inter nuboj (kaj tero); fulmotondro: vetero kun fulmo kaj tondro {7}

**analiz-** Dismeto aŭ aparta konsidero de la partoj, aspektoj de io

## Ĉapitro 12 5 radikoj

- id-** \* [infano; juna besto] (idoj: infanoj; posteuloj) (ĉevalido, ŝafido, reĝido, Napoleonidoj,...) {\*0}
- soci-** homoj kunvivantaj, kun komunaj normoj kaj divido de funkcioj; (bestoj:) kunvivanta aro kun funkcio-divido {7}
- erar-** \* fari neĝuste; fari malbone (dum oni ne volas fari malbone); misjuĝi; vojerari: iri laŭ neĝusta vojo {\*4}
- plu** \* senĉese; ne ĉesante; (ne plu: jam ne) {\*1}
- trotuar-** parto de vojo destinita por piedirantoj, apud la vojo destinita por veturiloj {8}

## Ne estas novaj vortoj en Ĉapitro 13

## Ĉapitro 14 32 radikoj

- konklud-** per rezono konstati sekvon el faktoj aŭ argumentoj {8}
- kovr-** \* igi nevidebla (aŭ fermi), surmetante ion; malkovri: (ankaŭ:) ekvidi, ekrimarki (aŭ montri) ion nekonatan {\*4}
- leĝ-** \* aro da reguloj, validaj por ĉiuj homoj en iu lando {\*5}
- lift-** aparato por levi homojn aŭ aĵojn (al alia etaĝo) {8}
- etaĝ-** ĉiuj ejoj de domo, kiuj estas je la sama nivelo {7}
- ŝtup-** \* horizontala breto, ŝtono aŭ rando (anstataŭ deklivo) por plifaciligi supreniradon; unu breto,... de ŝtuparo; (figure: unu plia grado de io gradigita) {\*5}

- minimum-** pli malgranda ne eblas; pli malmulte ne eblas; plej malgranda aŭ malalta dum iu periodo {9}
- pane-** akcidenta nefunkciado de aparato, aŭto,...; panei: halti, misfunkcii pro paneo {9}
- ring-** ronda objekto kun truo en la mezo (kiel "O") {7}
- serur-** aparato por ŝlosi (bone, sekure fermi) ion {7}
- observ-** rigardi kun daŭra atento; fari ion laŭ la reguloj {8}
- arm-** \* doni al iu ilojn por batali kaj defendi sin {\*6}
- normal-** antaŭvidebla laŭ la naturo, la kutimoj, la kutimaj kondiĉoj,... (ne stranga; ne speciala, ne miriga) {8}
- najbar-** \* homo, kiu loĝas apude; homo, kiu sidas apude {\*6}
- radik-** subtera parto de planto, per kiu ĝi prenas nutraĵojn kaj akvon el la tero, kaj per kiu ĝi estas fiksita al la tero; la fiksa, tena parto de io; fiksa, ne ŝanĝiganta parto de vorto (en "laboro" kaj "labori", "labor" estas la radiko); (matematiko: la (dua) radiko de 49 estas 7); radiki: havi siajn radikojn en... {7}
- ial** \* pro iu kaŭzo aŭ motivo {\*6}
- sugest-** venigi en ies penson iun ideon {X}
- respektiv-** Aparte rilatanta al nur unu el la pritraktataj objektoj
- kompar-** \* rigardi du aŭ plurajn aferojn por vidi la diferencojn kaj/aŭ similaĵojn {\*6}
- fantom-** figuro videbla sed ne palpebla; reaperanta mortinto; io ne vera, nur ŝajna {X}
- epok-** pli granda periodo dum historio {7}
- verd-** \* kun koloro de freŝaj herboj (la simbolo de Esperanto estas kvinpinta verda stelo) {\*4}
- juvel-** ornamaĵo el multekosta materialo (oro, arĝento, valora ŝtono,...) {8}
- teks-** dense interkrucigi fadenojn por fari ŝtofon {7}
- konserv-** \* teni ion tiel, ke ĝi ankaŭ poste estu, kiel ĝi nun estas, ke ĝi ne malboniĝu, ne difektiĝu, ne perdiĝu; konservaĵo: nutraĵo konservata (en ladskatolo,...) {\*5}

**histori-** \* (rakontoj pri) tio, kio okazis {\*4}  
**religi-** \* scio aŭ kono pri supernaturaj estuloj aŭ estaĵoj kaj pri la vivo post morto (kun rilataj agoj kaj normoj) {\*5}  
**verk-** \* arta skribaĵo (libro, rakonto, poemo), pentraĵo, skulptaĵo, muzikaĵo,...; verki: fari ion tian {\*5}  
**stud-** \* lerni ion dum pli longa tempo; legi kaj aŭskulti prelegojn por lerni {\*5}  
**vatikan-** La estraro de la Romkatolika eklezio  
**kelner-** servisto, kiu alportas manĝaĵojn aŭ trinkaĵojn {7}  
**muze-** domo, kie oni elmontras (ekspozicias) kolekto(j)n (artajn, sciencajn) {9}

## Ĉapitro 15 16 radikoj

**sekur-** sendanĝera {9}  
**embaras-** malfacila stato; necerteco (pro okazaĵo aŭ diraĵo); embarasi: meti (iun) en embarason {7}  
**ŝu-** \* (ofte leda) vesto por piedo {\*6}  
**freŝ-** \* nova, ne malboniĝinta; ĵus farita aŭ rikoltita {\*5}  
**sovaĝ-** en natura stato; ne hejmigita, bredita aŭ kreskigita; ne civilizita {8}  
**doktor-** \* iu, kiu studis en universitato kaj ekhavis finan diplomon; iu, kiu poste ankoraŭ verkis sciencajn libron por ekhavi la titolon "doktoro" {\*6}  
**defend-** \* (sin/iun): fari ion kontraŭ atako aŭ minaco {\*6}  
**ananas-** Genro el familio bromeliacoj (Ananas). Unu specio estas kulturata pro la ŝajnfrukto.  
**vin-** \* malforta (12% aŭ malpli) alkohola trinkaĵo el suko de vinberoj (Vitis) aŭ el aliaj fruktoj {\*5}  
**ornam-** plibeligi (per aldonajoj) {7}  
**pec-** \* parto el tuto, ne (plu) ligita al la tuto; rompaĵo; ero; unu el multaj samaj aŭ similaj {\*3}

**pret-** \* [laboro finita]; finfarita (ĝi estas preta); (do:) tuj uzebla/disponebla; finfarinta (li/ŝi estas preta); (do:) povanta tuj komenci fari ion (alian) (Ĉu preta(j)? Ek!) {\*4}  
**regul-** \* fiksita indiko aŭ instruo pri kiel oni faru ion (ĉiufoje same); regula: laŭ la reguloj; kvazaŭ laŭ regulo (ĉiufoje same, je sama horo, post sama periodo,...) {\*6}  
**tru-** \* malfermaĵo; en io: tiu loko, kie estas nenio (intencita: truo en muro por pordo aŭ fenestro; truo en vesto por trami butonon; ne intencita: truo pro difektiĝo aŭ foruziĝo); trui: fari truo(j)n {\*5}  
**gas-** \* io ne solida kaj ne likva (akvo je malpli ol 0 gradoj Celsiaj estas solido (glacio), inter 0 kaj 100°C likvo (akvo), super 100°C gaso (vapor)) {\*6}  
**lu-** ricevi ion por sia uzo, dum certa tempo, kontraŭ pago {7}

## Ĉapitro 16 1 radiko

**neniom** neniu kvanto; eĉ ne la plej malgranda kvanto {8}

## Ĉapitro 17 4 radikoj

**marŝ-** \* (piede) iri, regule kaj ne tro malrapide {\*5}  
**branĉ-** \* ne-ĉefa ligna parto de arbo; ligna parto de arbusto; dividaĵo de io; fako (branĉo de scienco, de industrio,...) {\*6}  
**kav-** malplenaĵo; pli-malpli profunda truaĵo en tero,... {7}  
**lamp-** \* ilo por lumi (per kandelo, gaso, oleo, elektro,...) {\*6}



## Ĉapitro 18 9 radikoj

**re-** \* [denove, ankoraŭfoje; inversdirekte] (rekonstrui, reskribi, ĝis revido!, redoni, reveturi, tien kaj reen,...) {\*0}

**nud-** senvesta; sen haroj; sen plumoj {7}

**kost-** \* kiom da mono necesas por fari aŭ ekhavi (aĉeti, produkti, venigi) ion; kiom da peno necesas por atingi ion {\*3}

**negliĝ-** Hejma senceremonia vesto

**tro** \* pli ol kiom estas bone aŭ bezonate {\*1}

**centr-** la mezo de cirklo, rondo, urbo, agado,... {7}

**ombr-** \* malpli hela loko, ne aŭ malpli prilumata (ankaŭ en formo de figuro); ombri: ĵeti ombron sur; malpliheligi {\*5}

**mantel-** longa vesto kun aŭ sen manikoj, kovranta la aliajn vestojn (banmantelo: kovras la nudan korpon (post bano)) {7}

**bot-** piedvesto (el ledo, kaŭĉuko aŭ simila materialo), kiu kovras ne nur la piedon, sed ankaŭ (parte) la kruron {7}

## Ĉapitro 19 7 radikoj

**kaban-** simpla (ofte ligna) dometo {9}

**protekt-** defendi, ŝirmi, helpi iun kontraŭ malbono aŭ danĝero {7}

**formul-** difinita, preskribita esprimo; simbola skribformo en scienco (H<sub>2</sub>O estas la formulo por akvo); formuli: precize vortigi; formularo: papero kun demandoj

precize formulitaj, apud kiuj oni skribu respondojn ankaŭ precize formulitajn {9}

**patent-** Dokumento rajtiganta iun ekskluzive ekspluati iun inventon.

**batal-** \* uzi forton kontraŭ iu (malamika); interbatiĝi {\*4}

**dis-** \* [al pluraj aŭ multaj direktoj; tiel, ke ekestas pluraj aŭ multaj pecoj] (disdoni, dispeli, disigi, distranĉi...) {\*0}

**alkohol-** likvo akirita per distilado de fermentintaj suker-enhavaj substancoj (C<sub>2</sub>H<sub>5</sub>OH) (kaj aliaj -OH); alkoholaĵo: trinkaĵo enhavanta alkoholon, ebriga {8}

## Ne estas novaj vortoj en Ĉapitro 20

### Ĉapitro 21 2 radikoj

**prunt-** \* dono por posta redono; prunti: doni (pruntedoni) aŭ preni (pruntepreni) kiel pronton {\*5}

**ĉes-** \* komenci ne esti; komenci ne okazi (ĝi ĉesis: ĝi ne plu okazas); ĉesi -i: komenci ne -i; ne plu -i (Ĉesu plendi!) {\*5}

### Ĉapitro 22 6 radikoj

**paf-** \* ĵeti ion per ilo, kun la celo vundi aŭ mortigi; ĵeti ion (kuglon) per ilo (pafilo), per eksplodo {\*6}

**buton-** \* malgranda aĵo alkudrita al unu flanko de vesto, por fermi la veston, metante la butonon tra truo (butontruo) en alia flanko de la vesto; malgranda elstaraĵo similforma; (prem)butono: malgranda klavo; butonumi: fermi per butono(j) {\*6}

**katen-** fortika ĉeno por ligi malliberulon; mankatenoj: ringoj ĉirkaŭ la manradikoj de arestito; kateni: ligi per kateno(j) {8}

**pont-** \* konstruaĵo por iri de unu flanko de rivero aŭ kanalo al la alia super la akvo (aŭ super valo, strato,...) {\*6}

**babil-** paroli pri ne (tre) seriozaj aferoj {7}

**herb-** \* (kutime verda) planto sen lignaj partoj {\*5}

## Ĉapitro 23 2 radikoj

**gratul-** bondeziri pro okazaĵo aŭ atingaĵo {8}

**ĉampan-** Franca tre konata ŝaŭmvino, elpensita de Dom Pérignon, benediktano, en la 18-a jarcento.

## Ĉapitro 24 3 radikoj

**kandel-** lumilo el sebo (besta graso), stearino aŭ vakso ĉirkaŭ meĉo (bruligebla ŝnuro) {8}

**statu-** skulptaĵo prezentanta homon aŭ beston en pli-malpli natura grandeco {9}

**preĝ-** \* paroli al dio; preĝejo: domo por di-servoj {\*6}

## Ĉapitro 25 1 radiko

**kultur-** \* ĉio, kio ne estas naturo; kiel homoj rilatas al sia ĉirkaŭaĵo kaj ŝanĝas ĝin: prilaborado de tero, kreskigo de plantoj, bredado de bestoj; organizado de kaj vivo en socio, kun normoj kaj kutimoj kaj la lingvoj uzataj; konstruado, metioj kaj industrio kaj la

iloj uzataj; plibeligo de la ĉirkaŭaĵo per bel-arto, teatraĵoj, literaturo, konstru-arto... {\*6}

## Ĉapitro 26 3 radikoj

**salut-** \* diri aŭ signi "bonan tagon!" aŭ "ĝis revido!" {\*4}

**danc-** \* sin movi (irante aŭ salt(et)ante) laŭ muziko {\*6}

**tint-** fari la sonon, kiun faras du glasoj, kiam tiuj interfrapiĝas {9}

## Listo laŭ alfabeto ordo 800 radikoj

absolut- 3	apenaŭ 3	bird- 4	ĉiam 2	dispon- 10	enket- 10
-aĉ- 5	aper- 1	blank- 2	ĉiel- 3	divers- 4	epok- 14
aĉet- 5	aplik- 6	blond- 3	ĉirkaŭ 5	doktor- 15	-er- 5
adapt- 3	apud 2	blu- 4	danc- 26	dokument- 4	erar- 12
admir- 3	-ar- 11	boks- 9	dangĉer- 5	dolĉ- 2	escept- 3
adres- 4	aranĝ- 2	bomb- 1	dank- 2	dolor- 9	esper- 3
aer- 4	arb- 6	bon- 2	daŭr- 2	dom- 3	esplor- 11
afer- 3	arest- 8	bot- 18	decid- 2	don- 1	esprim- 2
ag- 1	arm- 14	botel- 6	dediĉ- 11	dorm- 6	est- 2
agent- 2	art- 6	brak- 5	defend- 15	drog- 6	estim- 7
agrabl- 3	aspekt- 3	branĉ- 17	dek 3	dub- 2	-et- 2
aĝ- 3	atend- 1	brand- 6	deklar- 3	dum 2	etaĝ- 14
akcept- 3	atent- 2	bril- 3	dekstr- 9	duon 4	etos- 6
akv- 5	atmosfer- 3	bru- 3	delikat- 3	-ebl- 2	eŭrop- 1
aldon- 11	aŭ 1	brul- 6	demand- 2	eĉ 2	evident- 3
ali- 2	aŭd- 2	brun- 3	demokrati- 9	edz- 2	facil- 2
alkohol- 19	aŭskult- 2	buŝ- 4	depend- 2	efektiv- 4	fajr- 11
almenaŭ 2	aŭt- 9	buton- 22	des 5	efik- 2	fak- 11
alt- 1	aŭtoritat- 2	cel- 2	destin- 3	-eg- 2	fakt- 2
am- 2	aventur- 7	centr- 18	detal- 6	egal- 11	fal- 3
amator- 5	babil- 22	cert- 3	deten- 6	eĥ- 3	fam- 2
ambaŭ 5	baldaŭ 2	ceter- 3	dev- 2	-ej- 2	famili- 2
amik- 3	band- 7	cigar- 6	deven- 6	ek- 6	fantom- 14
analiz- 11	bank- 3	cirkonstanc- 5	dezir- 2	ekde 1	far- 1
ananas- 15	barb- 7	ĉambr- 2	diabl- 1	ekonomi- 2	fart- 4
angul- 5	bat- 2	ĉampan- 23	difin- 4	eksplo- 6	feliĉ- 2
ankaŭ 2	batal- 19	ĉantaĝ- 6	dign- 2	ekster 2	fenestr- 11
ankoraŭ 3	bedaŭr- 1	ĉapitr- 1	dik- 2	ekzempl- 3	ferm- 2
anstataŭ 9	bel- 2	ĉar 2	dir- 1	ekzist- 2	fi- 7
antaŭ 1	best- 6	ĉe 3	direkt- 2	el 1	fid- 2
apar- 11	bezon- 2	ĉef- 3	dis- 19	elekt- 6	fil- 3
apart- 2	bien- 3	ĉes- 21	diskret- 1	-em- 2	film- 4
apartament- 3	bild- 4	ĉeval- 6	diskut- 2	embaras- 15	filozofi- 2

fin- 1	gem- 3	impres- 5	kar- 3	konfidenc- 6	kutim- 2
fingr- 11	gen- 2	-in- 2	karaf- 11	konfirm- 5	kvankam 3
firm- 3	general- 2	indik- 6	karakteriz- 6	konklud- 14	kvant- 6
flank- 5	gentil- 11	industri- 2	kastel- 3	konsci- 2	kvazaŭ 2
fleg- 2	goj- 3	infan- 2	kaŝ- 3	konsekvenc- 6	labor- 3
flug- 1	gust- 2	inform- 1	katastrof- 3	konsent- 3	lac- 2
flustr- 2	halt- 6	injekt- 2	kateno- 22	konserv- 14	lamp- 17
foj- 2	har- 3	insist- 7	kaŭz- 2	konsider- 2	land- 2
for 2	harmoni- 6	inteligent- 5	kav- 17	konsil- 2	larĝ- 6
forges- 5	haŭt- 3	inter 6	kelk- 2	konsist- 11	las- 2
form- 5	hav- 2	interes- 2	kelner- 14	konstant- 9	last- 7
formul- 19	haven- 1	interromp- 3	kemi- 2	konstat- 5	laŭ 3
fort- 1	hazard- 2	interven- 3	kial 2	kontakt- 1	laŭt- 2
fot- 7	hejm- 6	intim- 2	kiam 2	kontent- 2	leg- 3
frap- 11	help- 2	invit- 4	kiel 2	kontraŭ 3	leĝ- 14
frat- 2	herb- 22	iom 3	kies 1	kontrol- 11	lern- 5
freŝ- 15	hezit- 3	ir- 1	kilometr- 3	kor- 2	lev- 4
fru- 6	hieraŭ 1	jam 3	kiom 2	koridor- 2	liber- 3
frukt- 5	histori- 14	jar- 2	kis- 4	korp- 3	libr- 11
fulm- 11	hodiaŭ 3	jen 2	klar- 3	kost- 18	lift- 14
fum- 4	hom- 2	jes 2	klik- 6	kovr- 14	lig- 3
funkci- 1	honest- 3	jun- 2	knab- 2	kravat- 8	lingv- 9
furioz- 6	hont- 3	just- 8	koler- 5	kred- 1	lit- 2
fuŝ- 5	hor- 6	juvel- 14	komedi- 5	kri- 7	loĝ- 3
gaj- 2	horloĝ- 6	ĵet- 5	komenc- 1	krom 3	lok- 3
garanti- 3	hospital- 2	ĵurnal- 7	komfort- 3	krur- 3	long- 2
gard- 4	humor- 2	ĵus 1	kompar- 14	ktp 11	lu- 15
gas- 15	humur- 7	kaban- 19	kompat- 2	kudr- 3	lud- 5
ge- 3	ial 14	kaf- 8	kompens- 9	kulp- 9	lum- 3
generaci- 6	iam 9	kalv- 3	komplet- 6	kultur- 25	lun- 6
glas- 6	-id- 12	kamp- 2	kompren- 2	kun 2	mal- 1
graf- 3	ideal- 3	kandel- 24	komunik- 3	kunven- 1	malgraŭ 11
grand- 2	iel 3	kant- 4	kon- 1	kur- 6	man- 3
gratul- 23	-ig- 2	kap- 2	koncern- 3	kurac- 2	manĝ- 4
grav- 3	ili- 2	kapabl- 2	kondiĉ- 3	kuraĝ- 3	manier- 1
grup- 5	imag- 2	kapt- 1	konduk- 6	kuŝ- 2	mank- 2

mantel- 18	mult- 3	okul- 2	pez- 3	pret- 15	represent- 4
marș- 17	mur- 2	ol 2	pied- 3	present- 2	respekt- 3
mask- 6	muskol- 3	ombr- 18	pistol- 6	prezid- 5	respektiv- 14
mastr- 2	muze- 14	oni 2	plaç- 2	princip- 3	respond- 1
maten- 4	muzik- 3	opini- 2	plan- 4	problem- 2	respondec- 1
mebl- 3	nağ- 5	ord- 6	plank- 9	produkt- 4	rest- 2
mem 2	najbar- 14	orel- 9	plej 2	profesi- 3	restoraci- 5
membr- 11	nask- 3	ornam- 15	plen- 2	profit- 9	rev- 3
memor- 3	natur- 3	pac- 2	plezur- 4	profund- 2	rezult- 5
mens- 5	naz- 2	paf- 22	pli 2	proksim- 1	ricev- 3
mesağ- 10	neces- 2	pag- 4	plor- 3	promen- 6	riç- 2
met- 4	negliğ- 18	pal- 4	plu 12	propon- 3	rid- 1
metod- 9	nek 2	pan- 11	plur- 9	propr- 3	rifuz- 11
mez- 3	neni- 1	pane- 14	polic- 1	protekt- 19	rigard- 2
miks- 8	neniam 2	pap- 3	politik- 2	prov- 2	rilat- 2
mil 6	neniel 1	paper- 3	pont- 22	prunt- 21	rimark- 5
milit- 3	neniom 16	par- 2	por 1	pseŭd- 7	rimed- 3
minimum- 14	nepr- 2	pardon- 3	pord- 2	publik- 5	ring- 14
minut- 2	nigr- 3	parol- 2	port- 3	punkt- 8	ripar- 2
mir- 2	nokt- 1	part- 2	post 2	pur- 3	ripet- 1
mirind- 4	nom- 3	partopren- 5	postul- 6	radi- 4	risk- 2
mis- 9	normal- 14	pas- 6	poș- 3	radik- 14	river- 3
mister- 6	not- 3	paș- 1	pošt- 2	rajd- 6	rol- 2
modern- 3	nov- 2	patent- 19	potenc- 2	rajt- 4	romp- 3
moment- 3	novağ- 3	patr- 3	pov- 1	rakont- 2	rond- 3
mon- 2	nud- 18	pec- 15	pozitiv- 5	rapid- 3	roz- 3
monat- 2	nun 2	pend- 6	pra- 3	raport- 6	ruğ- 3
mond- 2	nur 1	pens- 2	praktik- 6	re- 18	sağ- 2
mont- 3	obe- 9	per 2	prav- 2	reag- 2	salajr- 7
montr- 2	objekt- 2	perd- 2	preciz- 3	real- 3	salt- 2
morgaŭ 1	-obl- 6	perfekt- 6	prefer- 2	reciprok- 3	salut- 26
mort- 1	observ- 14	perfid- 5	preğ- 24	region- 8	sam- 3
mošt- 3	odor- 2	permes- 2	prem- 2	regul- 15	san- 2
motiv- 5	ofic- 3	person- 2	pren- 2	rekt- 3	sankt- 3
mov- 3	oft- 4	peruk- 6	prepar- 11	religi- 14	sav- 5
movad- 1	okaz- 1	pet- 2	preskaŭ 4	renkont- 2	sci- 1

sed 2	songĝ- 9	sven- 6	tiam 6	ven- 2
seĝ- 5	sonor- 9	ŝajn- 2	tiel 2	vend- 6
sek- 6	sovaĝ- 15	ŝanc- 2	ties 4	ventr- 3
sekret- 2	spec- 3	ŝanĝ- 3	tim- 2	ver- 1
sekretari- 2	special- 3	ŝat- 2	tint- 26	verd- 14
sekund- 9	spegul- 6	ŝerc- 4	tiom 1	verk- 14
sekur- 15	spert- 2	ŝir- 3	tir- 3	verŝajn- 5
sekv- 1	spion- 6	ŝlos- 9	ton- 2	vesper- 1
semajn- 8	spir- 2	ŝofor- 2	traf- 4	vest- 1
sen- 8	star- 3	ŝrank- 6	trankvil- 2	vetur- 2
sent- 1	stat- 3	ŝtat- 6	trans 3	vic- 7
serĉ- 3	statu- 24	ŝtel- 5	trans- 9	vid- 1
serioz- 2	stel- 6	ŝton- 3	transform- 6	vin- 15
serur- 14	strang- 2	ŝtup- 14	trezor- 2	vir- 1
serv- 2	strat- 1	ŝu- 15	trink- 1	viv- 2
sid- 3	streĉ- 2	ŝultr- 6	tro 18	vizaĝ- 3
sign- 3	strik- 7	ŝut- 8	tromp- 5	vizit- 2
silent- 2	stud- 14	tabak- 4	trotuar- 12	voĉ- 1
simil- 2	student- 4	tabl- 3	trov- 2	voj- 2
simpl- 2	stult- 2	tag- 5	tru- 15	vojaĝ- 3
sinagog- 1	sub 3	taks- 2	tuj 9	vok- 3
sincer- 2	sub- 6	tamen 2	tuk- 3	vol- 2
sindikat- 7	subit- 2	tas- 8	turn- 2	volv- 3
sinjor- 2	substanc- 6	task- 2	tuŝ- 3	vort- 2
sinten- 3	sufer- 2	taŭg- 3	tut- 2	zon- 3
sistem- 11	sufiĉ- 3	teatr- 5	-ul- 2	zorg- 3
situaci- 2	sugest- 14	teks- 14	un- 2	
skrib- 3	suk- 11	tekst- 8	urb- 3	
sku- 8	sukces- 2	telefon- 1	urĝ- 9	
soci- 12	sum- 6	tem- 2	util- 11	
social- 5	sun- 5	temp- 3	uz- 2	
soif- 11	super 2	ten- 3	valor- 3	
sol- 2	super- 9	ter- 3	varm- 6	
solv- 2	supr- 11	teror- 8	vast- 4	
somer- 6	sur 2	terur- 3	vatikan- 14	
son- 1	suspekt- 10	tial 2	vek- 2	

<b>gramatikaj finaĵoj</b>	<b>ĉefaj prefiksoj kaj sufiksoj por vortkonstruo</b>	
<p><b>-o</b> : [io ekzistanta]  <b>-a</b> : [kvalito; aparteno; rilato]  <b>-j</b> : du aŭ pli [<math>\geq 2</math>]  <b>-n</b> : -o -as --&gt; -on / -on &lt;-- -as -o  <b>-e</b> : [maniero; cirkonstanco; loko]  <b>-n</b> : [al] -o -as --&gt; -en / -en &lt;-- -as -o  <b>-i</b> : [ago/stato]  <b>-as</b> : [ago/stato: nun, ĉiam, kutime]  <b>-is</b> : [ago/stato: antaŭ nun]  <b>-os</b> : [ago/stato: post nun]  <b>-u</b> : [ago/stato: peto, konsilo, ordono]  <b>-us</b> : [ago/stato: kondiĉa]</p>	<p><b>-ado</b> : [daŭra aŭ ripeta ago; daŭra stato]  <b>-aĵo</b> : [io konkreta]  <b>-ano</b> : [homo: membro; loĝanto]  <b>-aro</b> : [multaj kiel unu tuto]  <b>bo-</b> : [parenco per geedziĝo]  <b>ĉef-</b> : [plej grava]  <b>dis-</b> : [al pluraj direktoj]  <b>-ebla</b> : [oni povas fari]  <b>-eco</b> : [kvalito mem de iu/io]  <b>-eg-</b> : [tre granda; tre forte]  <b>-ejo</b> : [loko, kie]  <b>ek-</b> : [(subite) komenci]  <b>-ema</b> : [inklino aŭ ŝato]  <b>-enda</b> : [oni devas fari]  <b>-ero</b> : [fragmento, peco da]  <b>-estro</b> : [homo: kiu gvidas, regas, prezidas]  <b>-et-</b> : [tre malgranda; tre malforte]  <b>ge-</b> : [la du seksoj kune]</p>	<p><b>-ido</b> : [infano; juna besto]  <b>-igi</b> : [fari -a, -o; kaŭzi ke io/iu -as]  <b>-iĝi</b> : [ekesti -a, -o; kvazaŭ io/iu -as ĝin/lin/ŝin]  <b>-ilo</b> : [instrumento, rimedo]  <b>-ino</b> : [virino; naski-pova individuo]  <b>-inda</b> : [estas bone, fari; merito]  <b>-ingo</b> : [io, en kion oni metas tion, por teni ĝin]  <b>-isto</b> : [profesia homo; sportulo; ism-ano]  <b>-ismo</b> : [ide-aro, pens-aro; malsano]  <b>mal-</b> : [tute ne; inverse; kontraŭe]  <b>mis-</b> : [ne ĝuste; erare]  <b>-obla</b> : [kvanto; fojoj: triobla=3x]  <b>-ona</b> : [parto: duona=1/2]  <b>re-</b> : [denove, ankoraŭfoje; inversdirekte]  <b>-ujo</b> : [io, en kio]  <b>-ulo</b> : [homo tia]  <b>-um-</b> : [io kun ia rilato al]</p>
<p><i>aktiva:</i>  <b>-ant-</b> : [komencinta, ne fininta, dum la ago]  <b>-int-</b> : [fininta, post la ago]  <b>-ont-</b> : [ne jam komencinta, antaŭ la ago]</p> <p><i>pasiva:</i>  <b>-at-</b> : [komencita, ne finita, dum la ago]  <b>-it-</b> : [finita, post la ago]  <b>-ot-</b> : [ne jam komencita, antaŭ la ago]</p>		